

Germana Esperantisto

Der Deutsche Esperantist

Oficiala Organo de
Germana Esperanto-Asocio (G. E. A.)
kaj de aliaj esperantistaj unuiĝoj



Offizielles Organ des
Deutschen Esperanto-Bundes E. V.
und anderer Esperantisten-Vereinigungen

Prezo:

por jaro Sm. 1,500 :: Provabono por 6 monatoj Sm. 0,750

Anoncoj:

Vidu tarifon en la anonca parto.

Preis:

pro Jahr M. 3,— :: 6 monatl. Probeabonnement M. 1,50

Anzeigen:

Siehe Tarif im Anzeigenteil.

8^a Jaro. No. 5.

Redaktion und Administration: Berlin SW., Lindenstr. 18/19

Majo 1911

Internacia Ekspozicio por Vojaĝo kaj Turismo en Berlin.

Unu el la plej belaj ekspozicioj specialaj, kiujn mi ĝis nun vidis, estas tiu ĉi I. E. p. V. k. T., kiu havas lokon en la grandegaj ekspoziciaj haloj apud la Berlin'a Zoologia Ĝardeno, de la 1a de Aprilo ĝis la 20a de Junio. Ĝi distingiĝas de similaj ekspozicioj precipe per la fakto, ke ĝi ne sole preferas la akcelon de materiaj interesoj, sed antaŭ ĉio ĝi estas entreprenita por vigligi la ĝojon pri amuza vojaĝado kaj turismo kaj favori amikajn interrilatojn inter la diversaj nacioj. Por la vojaĝanto kaj turisto ne ekzistas politikaj limoj; ili iras tien, kie ili opinias trovi belajn regionojn kaj mallaciĝon de la ĉiutaga laboro. Tiajn lokojn prezentas la I. E. p. V. k. T. en granda abundeco. Ne estas eble priskribi en mallonga artikolo ĉiujn vidindaĵojn de la ekspozicio; tio postulus verkadon de ampleksa volumo. Tie ĉi mi nur povas koncize raportiri pri la plej gravaj elmontraĵoj. Kiu interesiĝas pri detaloj — venu mem kaj vizitu la ekspozicion. Do, kara leganto, sekvu min en spirito, ni volas trarapidi la du grandajn halojn.

Kompreneble estas, ke en entrepreno, kiu estas vere internacia, kaj kiu celas faciligi la internaciajn interrilatojn, ne devas manki nia internacia lingvo. Kaj ĝuste ĉe ĉiu enirejo oni jam ekscias, ke Esperanto estas reprezentata, per jenaj afiŝoj: „Esperanto-Infirmejo sur la galerio en la ĉefa halo“. Enirinte tra la ĉefa enirejo oni ankaŭ tuj ekvidas antaŭ si sur la galerio la oficialan informejon de Germana Esperanto-Asocio kaj U. E. A., sole signitan per la vorto „Esperanto“, kiu brilas sur la supra parto de la informejo kaj estas videbla preskaŭ de ĉiu loko en la halo. Sed pri la esperanta afero mi parolos poste, unue ni rigardu la aliajn vidindaĵojn.

Ni turnu nin maldekstren. Post kelkaj paŝoj ni staras surprizitaj antaŭ grandega dioramo, kiu okupas vastan podion de la halo ĝis la plafono. Ĝi montras la insulon Rügen en la Balta maro tiel laŭnature, ke oni opinias sin vere troviĝanta antaŭ la kretrokoj de tiu fama insulo. Krom tio multaj bildoj kaj aliaj objektoj atentigas pri la diversaj banlokoj kaj admirindaj punktoj de Rügen. — Belega ankaŭ estas la panoramo

kaj plastika montro de „Glatzer Gebirgsland“ kaj parto de „Riesengebirge“ en Silezujo. Kun mirinda natureco estas kopiitaj la montoj kun siaj ĉarmaj valoj, en kiuj sidas pli-malpli konataj banlokoj, ekz. Schreiberhau. Hermsdorf, Krummhübel k. a. — Tiu ĉi panoramo okupas la mezon de la halo. Irante al la alia flanko, ni tuj troviĝas en la ekspozicio de „Elsass-Lothringen“, la lando de l' kasteloj. Tiun ĉi nomon la bela regiono vere meritas! Multaj el la kasteloj kaj ruinoj estas montrataj per artaj pentraĵoj kaj fotografiaĵoj, dum aliaj bildoj kaj plastikaj modeloj vidigas la belecon de la romantikaj „Vogesen“. — Apud Elsass-Lothringen ni trovas la ekspozicion de „Baden“, en kiu estas vidindaj du bele faritaj dioramoj de la urbo Baden-Baden kaj de „Triberger Wasserfall“, la plej granda akvofalo de Germanujo. — Sekvas la kolektiva ekspozicio de la ĉarma Turinga lando. Ĝi okupas tre grandan lokon kaj montras per multege da artaj bildoj, malgrandaj dioramoj kaj plastikajoj la diversajn vizitindajn urbojn kaj vilaĝojn en la ebenaĵo kaj inter la montoj. Por ni esperantistoj estas speciale interesaj la bildoj de Gotha, kie havis lokon la kvara germana Esperanto-Kongreso. — Proksime de Turingujo troviĝas la elmontraĵoj de „Bund Deutscher Verkehrsvereine“ (asocio de germanaj unuiĝoj por interrilatoj) inter kiuj estas vidaĵoj de multaj germanaj urboj. Reprezentata estas ankaŭ Augsburg, la urbo de la antaŭjara germana Kongreso, kiu same kiel Potsdam elmontras esperantajn gvidlibrojn. — Tre rimarkinda estas la ekspozicio de la reĝlando Saksujo. Antaŭ ĉio altiras nin dioramoj de Dresden kaj „Saksa Svisujo“, kiuj lokoj certe ankoraŭ estas en bona memoro de la partoprenintoj de la Kvara Internacia Kongreso. Sed la saksa lando ankaŭ montras pruvojn de la diligento kaj lerteco de sia loĝantaro, elmetinte specimenojn de belegaj punktoj, mane faritaj en Plauen kaj ĉirkaŭaĵo.

Nun ni iru en la apudan halon, kies teretaĝo kaj plej granda parto de la galerio estas rezervitaj por la „eksterlando“. Kaj tuj komenciĝas la malfacilaĵoj raportiri pri la belajoj de la ekspozitaj landoj. Unu parto estas ĉiam pli bela ol la alia! Nu, ni unue rigardu la altajn regionojn de Svisujo, la „plej bela lando de la mondo“, kiel diras Baron Hans

von Grotewill en sia taglibro.*) Kaj ŝajnas al mi, ke li estas prava! Fortega deziro ekkaptas la rigardanton, vidi en realeco la belajn regionojn kaj travagi la majestajn alpan montaron. Min ravis precipe tri belegaj panoramoj de Zürich, Vierwaldstätter See kaj Genève. Ĝuste antaŭ la lasta mi longe staris kaj pensis al niaj samideanoj, kiuj el tiu bela urbo regas la tutmondan Esperantiaron. — Ne malpli bela estas la ekspozicio de Aŭstrio, kiu detale konigas al ni la vizitindaĵojn de tiu multpopola lando. Ni vidas partojn el la aŭstriaĵoj kaj elegantajn banlokojn, de kiuj sin multe trovas en tiu benita de la naturo ŝtato. La aŭstriaĵoj pace konkuras en la ekspozicio per elmontrado de siaj plej belaj vidindaĵoj. Interesaj estas ankaŭ la kostumoj de la diversaj aŭstriaĵoj, montrataj per kolekto de grandaj pupoj.

Pli kaj pli la nordaj landoj fariĝas la celo de la vojaĝantoj kaj turistoj; eĉ dum la vintro ili estas ĉiam pli vizitataj pro siaj neĝaj regionoj, kiuj favoras la vintran sporton. Tial estas kompreneble, ke la landoj Danujo, Svedujo, Norvegujo kaj Finnlando montras al ni siajn belaĵojn tiel allogi, ke oni tuj deziras forvojaĝi kaj viziti la nordajn regionojn. Krom admirindaj panoramoj ili prezentas ankaŭ produktitaĵojn de siaj enloĝantoj. — Sed ni ne forgesu la ĉarman holandan ekspozicion, kiu prezentas al ni malnovan holandan ĉambron, el kiu oni rigardas al bela diorama de holanda pejzaĝo. Aliganta al la holanda ekspozicio ni vidas ekspozicion de la holanda kolonio Javujo, kiu montras al ni siajn strangaĵojn.

Sur la galerio de la dua halo ankaŭ havas lokon la tre interesa ekspozicio de la malnova urbo Lübeck, kie okazos la nunjara germana Kongreso. Preteririnte ĝin, ni ankoraŭ unufoje estas ravitaj per belegaj dioramoj de la „Braunschweiger lando“, kiuj montras al ni interesajn urbojn, same lokojn el la „Harz“, la ĉefa montaro de tiu lando.

Nun ni estas revenintaj en la ĉefan halon kaj staras antaŭ la Esperanto-Infomejo. Ĝi okupas amplekson de 20 kvadratoj, kiujn la ekspozicia direkto, ekkoninte la gravecon de Esperanto, senpage disponigis al G. E. A. La loka komitato, kiu starigis la infomejon kaj aranĝis la aligintan esperantan ekspozicion, klopodis havigi al si abundan materialon, por evidente pruvi la disvastiĝon kaj praktikan uzadon de nia lingvo. Ke la aranĝintoj bone sukcesis, estas videble je le unua rigardo. Sed ni eniru kaj detale rigardu la elmontraĵojn. — En la mezo de la infomejo, kiu estas konstruita kiel ĉambro, staras longa tablo, plenigita per esperantaj lernolibroj kaj vortaroj por multaj naciaj lingvoj, plie per komercaj prospektoj, katalogoj kaj gvidlibroj. Super la tablo pendas sur mallarĝa stablo en longa vico precize 107 esperantaj gazetoj vivantaj, oportune lokitaj. Ĉe la dekstra muro troviĝas granda bretaro kun multaj fakoj, en kiuj estas elmetitaj la ĉefaj verkoj de la esperanta libraro ĉiufaka. Elmeti la tutan libraron estis simple neeble, ĉar tio postulus kvaroblan spacon. Sur la maldekstra muro estas fiksitaj la objektoj de U. E. A.:

statistikaj kartoj, gvidfolioj, propagandiloj, plie komercaj prospektoj kaj aliaj aĵoj, kiuj atentigas pri la praktika uzado de Esperanto. Tute supre sub la plafono pendas sur ambaŭ muroj la Demonstraciaj Tabeloj de Direktoro Dro Möbusz, Lübeck, kiuj mirigas la vizitantojn pri la logika kaj simpla konstruo de nia lingvo. Super la enirejo oni pendigis grandan kolekton de esperantaj muzikaĵoj. La tuta riĉhava ekspozicio estas bone aranĝita, mi eĉ kuraĝas diri: ĝi estas preskaŭ tro plena, kvankam ankoraŭ ne estas elmetita la tuta disponebla materialo! Tamen la ekspozicio bonege efikas, kaj multege da personoj ĝin vizitas. Ili estas detale informataj pri nia afero de Berlin'aj samideanoj, kiuj dum la tuta daŭro de la I. E. p. V. k. T. alterne ĉeestas. Ofte, precipe dimanĉon, la alfluo de interesuloj estas tiel granda, ke eĉ 6 ĉeestantaj informantoj ne povas plenumi ĉiujn dezirojn. Kaj de tago al tago kreskas la nombro de la vizitantoj de la I. E. p. V. k. T., tiel ke la esperanta ekspozicio ankaŭ rajtas atendi ĉiam pli grandan viziton. Jam multaj germanaj kaj alilandaj esperantistoj ĉeestis kaj esprimis sian ĝojon pri nia ekspozicio. Inter ili estis samideanoj el Anglujo, Hispanujo, Rusujo, Egiptujo, Svedujo, Norvegujo, Danujo, Holandujo, Hungarujo, Ameriko k. a. — Sed estas certe, ke ankoraŭ venos pli multe da esperantistoj el diversaj landoj, ĉar U. E. A., laŭ oficiala komisiono de la ekspozicia direkto, klopodos aranĝi karavanojn al Berlin. Detalojn pri tio oni trovas en la gazeto „Esperanto“.

Granda ankaŭ jam estas la nombro de la personoj, kiuj per nia ekspozicio estas gajnitaj por nia afero, kaj konstante la nombro kreskas. — Depost Pasko ni havas plian interesadon en nia infomejo: La Berlin'a firmo Aktien-Gesellschaft für Lehrmittel-Apparate, kiu instruigas fremdajn lingvojn per helpo de fonografo, disponigis al ni aparaton kun esperante enparolitaj cilindroj. Per tio ni povas aŭdigi esperantajn tekstojn en poezio kaj prozo, por montri la belsonecon de nia lingvo. Unu el la cilindroj surhavas monologon el „Hamleto“, parolitan de la fama aktoro Emanuel Reicher, la aranĝinto de la Ifigenio-prezentado en la Kongreso de Dresden 1908. — La firmo ankaŭ interrilatis kun G. E. A. pro enparolo de esperanta teksto por kursoj. Jen grava afero, pri kiu ankoraŭ estos detale raportata.

Sed nun mi devas ankoraŭ paroli kelkajn vortojn pri alia „mondlingva ekspozicio“ en la I. E. p. V. k. T. Mi celas la elmontron de „Vereinigung für internationale Hilfssprache“ (Ido). La idistoj anoncis tiun ekspozicion jam longe antaŭ la malfermo de la I. E. p. V. k. T. kun granda bruo en ĉiutagaj kaj iliaj gazetoj, kaj oni rajtis supozi, ke ili prezentos grandan materialon, kiel eble plej bone lokitan. Sed mi devis longe serĉi, antaŭ ol mi trovis la lokon de la idista ekspozicio. Fine mi sukcesis. Kaj kion mi vidis? Malgrandan tablon kun muro, kies tuta amplekso estas maksimume 4 kvadratoj, sur kiuj estas elmetitaj kaj fiksitaj kelkaj lernolibroj, vortaroj kaj gazetoj, ĉiam kun sufiĉa interspaco, por ke unu ne tuŝu la alian! Sed ŝajnas, ke eĉ tiu malgranda loko estas ankoraŭ tro granda, ĉar la idistoj, por almenaŭ plenigi ĝin, devis elmeti dekfoje la libreton „Deutsches Hilfsbüchlein“ (germana helplibreto) kaj 6 samajn numerojn de „Idano“. Kaj kion diras nia Majstro, eksciante, ke ankaŭ lia verko „Pri Reformoj“ troviĝas inter la idistaj elmontraĵoj?

*) Taglibro de l' Barono Hans von Grotewill. Notoj pri la I. E. p. V. k. T. — Oficiala broŝuro pri la ekspozicio. Laŭ komisiono de la direkto en esperanta lingvo eldonita de G. E. A. (Prilaboris Arnold Behrendt). Havebla ĉe la Esperanto-Komisiono por la I. E. p. V. k. T., Berlin S.W. 68, Lindenstr. 18/19. Prezo por Germanujo 0,35 M., por eksterlando du respondukuponoj, afrankite.


Bedaŭrinda „Mondlingvo“ (tiu ĉi vorto en germana lingvo fiere brilas sur la muro), kiu tiamaniere devas riĉigi sian librareton!! Iu ajn literaturaĵo en Ido ne estas elmetita; krom la lernolibroj kaj vortaroj el 1908, kiuj hodiaŭ jam estas preskaŭ senvaloraj, nur kelkaj nacilingvaj pritraktoj pri lingvaj demandoj. Kaj neniŭ ĉeestas, kiu povus atentigi la preterirantojn pri la „grava unika mondlingvo“. Por niaj samideanoj en la esperanta informejo estas granda plezuro, post monro de nia ekspozicio rekomendi al la vizitantoj la priirigordon de la alia „pli bona mondlingvo“, kiu stariĝis sur la tombo de Esperanto! Ĉiuokaze ni

devas danki la idistojn por la bonega reklamo, kiun ili faras per sia ekspozicio por la „mortinta Esperanto“.

Sed dankon ni ŝuldas ankaŭ al tiuj personoj kaj entreprenoj, kiuj helpis la lokan komitaton per mona subteno aŭ pruntedonado de ekspoziciaĵoj aranĝi tian belan kaj efikplenan esperantan ekspozicion. —

Entute la I. E. p. V. k. T. estas vera vidindaĵo, kaj neniŭ hezitu viziti ĝin. Multege da elmontraĵoj mi ne povis mencii, kaj oni pardonu, se mi ĝuste forgesis ion, pri kio unu aŭ alia samideano volonte ion estus aŭdinta.

F. Ellersiek.



Lübeck, la urbo de la germana Esperanto-Kongreso 1911.

II.

Lubeke aller Staden schon
von riker Ehre dregest du de Krone.

La memoraĵoj de gloraj jarcentoj ĉirkaŭas la fremdulon, kiu vagas tra la malnovaj stratoj de Lübeck. Kiu unufoje vidis ĝian fieran mezepokan silueton, precize videblan antaŭ la blua ĉielo, kiu unufoje admiris kun interna edifo ĝiajn riĉajn konstruaĵojn kaj artaĵojn, tiu konservos en si ĝian aspekton kiel unu el la plej amataj memoraĵoj.

Estas ĝuste, ke apud la imponaj, malnovaj preĝejoturoj hodiaŭ leviĝas altaj kamentuboj de fabrikoj en la aero kiel ekkoniloj de la nova tempo, kaj vere estas, ke elektraj lampoj nun lumigas magazenojn kaj grandajn loĝdomojn tie, kie iam ĉe la flagranta lumo de lanternoj, pendantaj meze super la stratoj, la gotikaj ŝtupar-frontonoj de malnovaj komercistodomoj desegnis fantaziajn konturojn je la nokta ĉielo — sed kiu kolerus pro tio la estantecon? Tio ja estas la atributoj de varme pulsanta vivo, de nova tempo de kreado kaj agado, kiu volas kontentigi nin, la homojn de la estanteco. Ne jam la spirita fajro de la malnovaj Hansanoj estingiĝis; kune kun la reviviĝo de la germana imperio ankaŭ Lübeck ree fortiĝis, kaj ĝi ĉiam estas kapabla, kunlabori la grandajn taskojn de la estonteco de Germanujo.

Lübeck, nuntempe havanta ĉirkaŭe 100 000 loĝantojn, montras la simptomon de transturniĝo kaj de prospera progreso. Apud la trankvila komercurbo, kiu vidis sian ĉeftaskon ĝis nun en la interrilatoj kun la baltmaraj landoj, evoluas rapide industriloko. Laŭ la postuloj de la novtempo, Lübeck interesiĝis pri ĝi ĝustatempe, malgraŭ la necesaj grandaj monoferoj. Por la komerco oni devis krei plifaciligojn, se Lübeck volis progresi, kaj la fervojoj, la havenaj instalaĵoj, la pliprofundigo de la Trave kaj fine la granda farajo, la Elbe-Trave-kanalo dankas sian ekziston al tiu ĉi neceso. Nur per tiu farado la urbo povis sukcesi, daŭre defendi sin kiel ĉefa transitloko de la norda komerco al la koro de Germanujo kaj kiel grava import- kaj eksportloko. La ĉefa rimedo, per kiu Lübeck esperas daŭre okupi sian lokon en la estonteco, estas — kiel jam

dirite — tre energia industri-politiko efektiviĝita jam de kelkaj jaroj. Jam dum malmultaj jaroj montriĝis, ke la industrio scias ŝati la avantaĝojn, kiujn prezentas al ĝi la Lübeck'a industri-teritorio. Altfornejo, filio de Baden'a fabriko de terpotajoj, oleomuelejo kaj pluraj hemiaj fabrikoj stariĝis ĉe la bordoj de la Trave. Kelkaj malnovaj Lübeck'aj societoj kaj firmoj multe pligrandigis la ampleksojn de siaj laborejoj. Ĉio tiel promesas por la estonteco tre profitan evoluadon. Lübeck do bezonos ĉiujn siajn fortojn por ne reperdi sian malfacile gajnitan pozicion en la tro potenca konkuro pri la komerca transito kun la baltmaraj landoj. Sed:

„Ob dir der Herbst die heitren Bänder
vielfarbig um die Schläfe schlingt,
ob er dir wild das rauhe Lied,
das Sturmlied aus Nordosten singt —
Steh fest! Und kehr die Giebelsterne
trotzig dem alten Gegner hin!
Und auch im Braus der Zeiten — halt stand!
Gott schirm dich, Ostseekönigin!“

III.

Ke la plivastiĝo de Lübeck kiel industria urbo kaŭzis kelkan aliĝon en la aspekto de la urbo kaj forrabis al ĝia ĉirkaŭaĵo tiun aŭ alian idilion, estas kompreneble. Sed, ke ĝis nun perdiĝis ne ĉio, kion Lübeck posedis antaŭe, pri tiu fakto niaj gastoj povos konvinkiĝi per nura promeno tra la urbo. Multnombraj estas ankoraŭ hodiaŭ la artaĵoj, kiujn enhavas niaj preĝejoj, la magistrata domo ktp., rekompencanta estas ankaŭ vizito de la muzeo, kaj kelka ĉarma idilio de strato ĝojigas la artsentan okulon dum migro tra la urbo. Lübeck estis ja ankaŭ la ĉefo de la „Hanso-arto“. La nova art- kaj kulturesplorado kaj la Lübeck'a loka esplorado montris al ni dum la du lastaj jardekoj, ke multaj Lübeck'aj artaĵoj de arkitekturo, de pentrado, de orafarto ktp., kiujn niaj prapatroj rigardis ankoraŭ kiel holandajn, francajn aŭ italajn farajojn, estas

majstroverkoj de Lübeck'aj artistoj. Kelka nomo de malnova artisto nun ree estas konata kaj honorata. Oni scias hodiaŭ, ke Lübeck, kiu okupis dum jarcentoj la ĉeflokon de la potenca Hanso-asocio per la riĉo, la influo kaj la saĝo de siaj burĝanoj, estis ankaŭ la centro de riĉega arta farado.

Sed ankaŭ en la plej nova tempo, dum la 19a jarcento, nomoj de Lübeck'aj artistoj kaj artistinoj aŭdigis sin en la vasta mondo, ekzemple la nomoj de la pentristoj Overbeck, Milde, Cordes, Carstens, Rettich, de la pentristino Elisabeth Reuter kaj, neforgesinde, tiu de la poeto Emanuel Geibel. Kaj ankaŭ nuntempe Lübeck povas esti fiera pro tio, ke ĝi estas la patruro de nombro da eminentaj vivantaj artistoj. Ni ĉi tie volas rememorigi la verkistojn kaj poetojn Thomas Mann kaj Heinrich Mann kaj sinjorinon Ida Boy-Ed, la pentristojn Gotthardt Kühl, Hermann Linde-Walther kaj Hermann Linde, Maria Slavona, la gravuristojn Hugo Struck kaj Heinrich Eickmann, la pentriston kaj gravuriston Hugo Höppner, konatan per la nomo Fidus, la skulptistojn Fritz Behn, Hans Schwegerle, Joachim Pagels, kaj multajn aliajn.

Oni vidas, ke Lübeck, la serioza komercurbo, povas montri pli multe da famaj laborantaj artistoj, ol kelka urbo, kies ĉefatributoj estas ĝiaj artsento kaj artĝojo. Tiel montriĝas ankaŭ en la fako de l' arto vigla vivo kaj kreado.

Malgraŭ kelka malĝoja sorto kaj multaj gravaj eraroj ni konservis Lübeck'on, nian urbon, libera kaj igis ĝin granda kaj bela per la diligento de niaj propraj manoj, per nia persista entreprenemo kaj per nia liberala tendenco. Al niaj karaj samideanoj de proksime kaj malproksime plaĉu inter niaj muroj! Ke la tagoj de la venonta kongreso ĉe ĉiuj ankaŭ poste reveku gajajn rememorojn je tiu urbo, kiun nia imperiestro foje nomis „la plej germana el la germanaj urboj“ — tio estas nia sincera deziro. Tial:

Estu bonvenantaj en Lübeck!

Krauss-Böbs.

El la urbo de la „Sepa“.

Antwerpen, la 15an de Aprilo 1911.

Multaj samideanoj petas sciigojn pri la literaturaj konkursoj, organizataj okaze de la Sepa Kongreso. Jen kelkaj detaloj.

Ĉiuj esperantistoj povas partopreni en la konkursoj. La manuskriptoj devos esti alvenintaj antaŭ la 1a de Julio ĉe S-ro Dro W. Van der Biest, Minderbroedersrui, 76, Antwerpen. Ili ne povos esti skribitaj de la aŭtoro mem, kaj devos porti la numeron de la konkurso kaj devizon, ripetitan sur fermita koverto enhavanta la nomon de la verkinto.

Mi faras varman alvokon al ĉiuj esperantistaj eldonistoj, administracioj de esperantistaj ĵurnaloj, esperantistaj organizacioj, aŭtoroj kaj ĉiuj bonvolemaj samideanoj, por ke ili aljuĝu, kiel eble plej baldaŭ, premiojn kaj difinu pritraktotajn temojn.

La ĝisnunaj favorantoj de la konkursoj estas:

1. **Loka organiza komitato de la kongreso.** — Historio de Esperanto, ± 20 paĝoj, formato de Belga Esperantisto: 1a premio: 40 Sm.; 2a premio: 20 Sm.

2. **Redakcio de „Belga Esperantisto“.** —

Originala novelo ± 12 paĝa, formato de B. E. — Premio: 20 Sm.

3. **Antverpena Grupo Esperantista.** — Pri la utilo de Esperanto por la komerco; kiel enkonduki la uzadon de nia lingvo en la komercajn rilatojn, 5 paĝoj, formato de B. E. Premio: 20 Sm.

4. **La Verda Stelo, esperantista grupo, Antwerpen.** — Pri la utilo de Esperanto por la laboristoj; kiel enkonduki nian lingvon en la laboristaron. — Premio: 20 Sm.

5. **S-ro Frans Schoofs, Antwerpen.** — La malnova flandra pentrista skolo. Premio: 12 Sm.

6. **S-ro Dro Pedro Ruiz Prieto, Sevilla.** — Plej taŭga procedo kaj plej efikaj rimedoj uzotaj de la esperantistoj kaj speciale de la Internaciaj Kongresoj, por atingi de ĉiuj registaroj la oficialan starigon de la deviga instruado de Esperanto en la duagrada lernejoj. Premio: 40 Sm.

7. **Tutmonda Esperanto-Anoncekspedo, firma Th. Anding, Gervinusstrasse 7, Charlottenburg (Berlin).** — Verku efikan broŝuron pri la utilo kaj la agado de la T. E. A. (kun modelaj ekzemploj pri la plej bona uzo de la T. E. K.-laborfakoj). Minimume 7 prespaĝoj laŭ monoformato. Premio: 5 Sm. kontanta mono kaj por 5 Sm. da Esperanto-specialaĵoj.

8. **S-ro Oscar Van Schoor, Antwerpen.** — Pri la batalo por la akiro de la lingvaj rajtoj en malgranda lando, ekz. Bohemujo, Kroatujo, Flandro, aŭ alia, 5 paĝoj formato de B. E. Premio: 12 Sm.

9. **Libera Penso, internacia societo de esperantistaj liberpensuloj.** — Libera penso en la moderna literaturo. Premio: 10 Sm.

10. **S-ro John P. Nix, Eastbourne, Anglujo.** — Soneto, temo laŭvola. Premio: 5 Sm.

11. **La Revuo.** — Originala studo pri historio, literaturo aŭ arto. Maksimume 25 paĝoj el La Revuo. 1a premio: 40 Sm.; 2a premio: 20 Sm.; eventuale aldonaj premioj.

12. **Fervoro, esperantista grupo, Antwerpen.** — Kvarversaĵo, temo laŭvola: Premio: 20 Sm.

13. **Ĉekbanko Esperantista.** — Klarigo de la esenco de ĉekoj kaj transpagiloj kaj ilia tasko kaj utilo en la komerca pagado. Premio: konto ĉe la Ĉekbanko kun kredita saldo de 25 Sm.

14. **Juneco, esperantista gazeto.** — Rakonto, novelo aŭ versaĵo (temo laŭvola), verkita de persono malpli ol dudekjara. Premio: bela arta objekto.

15. **F-ino Maria Moreau, Brüssel.** — Rolo de la virinoj en la esperantista movado; plej taŭgaj rimedoj por enkonduki Esperanton en la internaciajn virinajn instituciojn. Premio: 12 Sm.

Nu, karaj gelegantoj, kiu el vi plilongigos la liston?

Provizoraj programoj de la kongresaj festoj kaj de la postkongresa vojaĝo estas pretaj. Mi publikigos ilin en la venonta numero.

S-roj Jan De Vos, urbestro, kaj Dro Victor Desguin, skabeno de la Publika Instruado, akceptis honoran prezidantecon de la kongreso.

La urbastraro metis senpage je la dispono de la Sepa, dum la tuta daŭro de la Kongreso, la belegan novan Flandran Operejon.

Jan.

Germana Kroniko.

Ni tre petas ĉiujn grupojn, kiel izolitajn samideanojn, ke ili sendu al ni kiel eble plej akurate mal-longajn raportojn pri ilia agado kaj pri la progresoj de Esperanto en ilia urbo aŭ regiono. La raportoj devas alveni ne pli malfrue ol la 20^{an} de ĉiu monato.

Augsburg. La Esperanto-Grupo (sidejo: Hotel 3 Mohren) senĉese laboras por la disvastigado de nia afero. Precipe oni celas pliperfektigi la membrojn en la lingvo. Por enkonduki la lingvon en pli altajn societ-rondojn S-ro Beideck gvidas 3 privat-kursojn, en kiuj regas granda fervoro kaj lernemo. Kvankam laborante sur serioza bazo, la grupo ne forgesis la plezuron kaj aranĝis belegan karneval-balon en la ĉambregoj de l'hotelo „3 Mohren“. Por atentigi la loĝantaron pri la utilo de nia lingvo, la grupo eldonis kaj dissendis flugfolion „La utilo de Esperanto por celado de interrilatoj por fremduloj“. En la lasta kunsido la grupo akceptis novan regularon. 4 novaj kursoj de S-roj instruisto Martin, Arnold kaj Beideck komenciĝis.

Bartenheim i. Els. Esperantan grupon fondis ĉi tie S-ro Baumann, prezidanto de la Mülhausen'a grupo. La unua kurso kun 15 ĝelernantoj estos gvidata de S-ro Kannengieser. La grupo aliĝos al G. E. A.

Berlin. La plej grava okazaĵo nun estas la Internacia Ekspozicio por Vojaĝo kaj Turismo, pri kiu estas detale raportata en alia loko de tiu ĉi numero. La vizitantoj de la ekspozicio, vidante la esperantajn elmontraĵojn, treege miras pri la jama graveco de nia afero. La sekvo estas, ke multaj interesuloj enskribis sin por kursoj, kiuj komenciĝos en diversaj kvartaloj de Berlin kaj en Charlottenburg. — Pro la ekspozicio ankaŭ multaj eksterlandanoj estis en Berlin kaj vizitis la grupkunvenojn. Tre interesa estis parolado de S-ro Naklé el Kairo, pri kies vojaĝo tra Germanujo per Esperanto jam estas raportita en la antaŭa numero. — Post parolado de S-ro L. Schlaf, la 14an de Aprilo fondiĝis „Klubo de laboristaj esperantistoj“ kun 52 membroj, kiuj partoprenas senpagas kurson gvidatan de S-ro Adolf Sproeck. S-ro Sproeck ankaŭ estas prezidanto de la grupo. — La grupo nordberlina rekonstituiĝis; kunvenoj ĉiumerkrede en „Oranienburger Festsäle“, Chausseestr. 16. Oficejo troviĝas ĉe S-ro W. Schmidt, Berlin N. 24, Linienstrasse 124. En kunveno, kie parolis S-ro Wichert, ĉeestis pli ol 70 personoj. — Plie fondiĝis nova sekcio „Oriento“, kies prezidanto estas S-ro P. William. Kunvenoj ĉiŝaŭde je la 8^{1/2}a en „Marinehaus“. — La unuiĝo de komercaj oficistinoj aranĝis grandan feston, en kiu la esperanta sekcio de tiu unuiĝo sub gvidado de F-ino Piehlke faris efikan propagandon por nia lingvo. Estis gajnataj nombro da partoprenontinoj por nova kurso, kiu baldaŭ komenciĝos.

Braunschweig. Okaze de la komitata kunveno de G. E. A. estis aranĝita propaganda vespero, en kiu S-ro Dro Arnhold, anstataŭante S-ron Dron Kandt, parolis pri: „Kio estas, kion celas kaj kion povas efiki Esperanto“. Sekvis deklamoj kaj kantoj.

Bremen. Interesan vesperon pasigis la tiea grupo dum la travojaĝo de S-ro Naklé-Kairo. Li prezentis al la ĉeestantoj tiujn paroladojn, pri kiuj nia

antaŭa kroniko raportis sub Köln, kaj akiris same sinceran dankon kaj aplaŭdon kiel en tiu urbo. — En la najbara Achim S-ro instruisto Fricke-Bremen propagande parolis en la instruista unuiĝo.

Chemnitz. La sukcesoj de la tie okazinta kunveno de la Saksa Esperantista Ligo vidiĝas per diversaj kursoj malfermitaj. — En la lernejo de Chemnitz-Schönau S-ro instruisto Hahn donas esperantan lecionon dufoje po semajno al la du superaj klasoj.

Colmar i. Els. Komenciĝis nova kurso de la grupo.

Dresden. La estraro de la „Saksa Esperanto-Instituto“ havis sian ĝeneralan kunvenon. Bedaŭrinde mortis dum la pasinta jaro S-ro komerca konsilisto ĝenerala direktoro Förster, la iniciatinto de la instituto, kies influo kaj konstanta intereso liveris al la instituto plej valoran subtenon, moralan kaj financon. S-ro Dro Arnhold, anstataŭanto de Dro Schramm, post memorigo pri la meritoj de la mortinta membro donis raporton pri la agado de la instituto dum la pasinta jaro. Nun la direkcio precipe okupiĝas pri la preparoj por la Internacia Higieno-Ekspozicio, kiu okazos tiun jaron en Dresden, kaj kie Esperanto trovos tre oftan kaj indan reprezentadon. — Rimarkinde estas, ke la instituta biblioteko pruntedonis entute pli ol 1700 volumojn, el kiuj konsiderinda nombro eĉ estis postulitaj de ekstersaksujaj samideanoj.

La 3an de Aprilo okazis la unua publika esperanta ekzameno en popola lernejo de la geknaboj, kiujn efike instruis S-ro instruisto Sykora. La reprezentanto de la direktoro, multaj instruistoj kaj multnombra ge-esperantistaro ĉeestis.

En „Hollacks Etablissement“ la venintan tagon 25 geknaboj, kiuj lernis dum unu jaro Esperanton en la lernejo, fondis la unuan grupon por junaj geesperantistoj de Dresden. La grupo estis nomata „En juneco nia espero!“ Unua prezidanto fariĝis Artur Zickler, 14 jara, dua prezidanto kaj kasisto Rudolf Rosch, 12 jara. La grupo aliĝos al G. F. J. E. La kotizaĵo po membro estas semajne 1—5 Pf laŭvole. — En „Societo Esperanto“ la 11an de Aprilo nia egipta samideano S-ro Raphael Naklé faris paroladon, tre aplaŭditan de granda aŭskultantaro.

En la kunveno de U. E. A.-anoj oni decidis eldoni gvidfoliojn tra Dresden.

Düsseldorf. Fondiĝis laborista grupo post parolado de S-ro Schlaf. S-ro Luis instruas la gajnatajn 50 interesulojn.

Frankfurt a. M. S-ro Wallon eliĝis el „Societo Esperanto“, lin anstataŭis S-ro Wittke, S-ro Taenzer fariĝis kasisto. Paroladoj dum la kunvenoj pri diversaj temoj bone efikis.

Frankfurt a. O. Al la 3a datrevena festo de la fondiĝo venis multaj aliurbaj gastoj. La multenhava programo kontentigis ĉiujn ĉeestantojn; dimanĉe oni aranĝis komunan ekskurson.

Gleiwitz kaj Görlitz. Komenciĝis novaj kursoj, aranĝitaj de la tieaj societoj.

Halberstadt. La grupo bedaŭrinde perdis du el siaj plej fervoraj membroj. S-ro von Eickstedt, unu el la fondintoj de la grupo, forloĝiĝas; S-ro Riemann entreprenos longedaŭran vojaĝon, kiu havos

specialan intereson tial ke li uzos ĉie nur nian lingvon kaj la helpon de samideanoj. Por la ekŝigantoj la grupo aranĝis adiaŭan vesperon.

Kassel. Sukcesplene parolis S-ro Sandrock en „Verband Deutscher Handlungsgehilfen“, kies tiea unuigo aranĝis kurson kaj fondos specialan sekcion esperantan. La komerca lernejo de S-roj Blunck kaj von Boehn ankaŭ enkondukis Esperanton — Post parolado de S-ro Schlaf-Dresden fondiĝis laborista grupo, la instruadon prizorgas S-ro Rust.

Krefeld. Enhavoriĉa ekspozicio, metia, industria kaj artmetia, daŭre de la 24a de Majo ĝis la mezo de Julio de la nuna jaro okazos en tiu urbo.

Krefeld estas fama pro sia silka kaj velura fabrikado. Tial la elmetotaj objektoj precipe rilatas al tiu fabrikado. Tamen aliaj objektoj ankaŭ estos prezentotaj el Krefeld kaj el ĝia ĉirkaŭaĵo. Ĉi tio ĉio allogos amason da homoj. Tial, ke nia lingvo ne sufiĉe disvastigis sin en la suba Rejnlando, kie troviĝas multe da grandegaj fabrikejoj, la „Esperanto-Societo Krefeld“ intencas, fari efikan propagandon sub la aŭspicioj de U. E. A., uzonte tian okazon.

Pro tio la „Societo“ rezervigis al si lokon en la ekspozicio, sur kiu ĝi volas elmeti propagandan materialon kaj krom tio malgrandajn objektojn metiajn, industriajn, artmetiajn ktp. el ĉiuj ajn lokoj kaj landoj, por montri, ke „Esperanto“ sole sufiĉas por komunikigi kun ĉiuj popoloj, kaj ke ne estas necese, bezoni dudek aŭ plimulte da fremdaj lingvoj. — Por ke la Societo atingu sian celon, estas dezirinde, ke ĉiu ajn samideano, se tio estas ebla al li, sendu al la tiea Societo malgrandajn objektojn de sia negoco, ĉu metia, aŭ industria aŭ arta ktp. Kaj se li ne povos sendi la specimenojn mem, tiam li bonvole sendu modelojn, desegnojn, prezarojn aŭ aliajn komercajn paperojn, por pleniĝi la luitan spacon per divers-specaj objektoj. Estas eble, ke per tio la alsendonto ankaŭ faros negocajn interrilatojn. Ĉar dum la daŭro de la ekspozicio ĉiam ĉeestos iu, aŭ el la Societo aŭ alia samideano, por klarigi kaj rekomendi aŭ referenci. — La bone pakitajn objektojn el la eksterlando oni bonvolu sendi kiel modelojn kaj ne aldoni: „Specimeno sen valoro“.

Ĉiujn alsendaĵojn oni direktu al la prezidanto de la

„Esperanto-Societo Krefeld.“

S-ro Seb. Börgermann

Oberstr. 72

Krefeld, Germanujo.

Königshütte. Pro la konsiderinda intereso, kiu montriĝis tie por nia afero, povis fondiĝi esperantista grupo, al kiu tuj aliĝis 23 membroj.

Leipzig. En „Marinegarten“, Karlstr. 10, S-ro Raphael Naklé faris paroladon, same aplauditan kiel en la aliaj urboj, kiujn li vizitis.

Magdeburg. Dum la jara ĉefkunveno S-ro Stark povis raporti pri ĝojigaj sukcesoj de la tiea grupo. Interalie li raportis, ke nuntempe entute 150 personoj, en tiu urbo, estas instruataj en nia lingvo, kaj ke inter ili troviĝas 18 policaj oficistoj.

Tre promesprena estas eksperimento de komuna vojaĝo peresperanta de diversaj grupanoj (inter ili kelkaj lerneĵanoj), kiu estos organizata kaj gvidata de S-roj Rockmann kaj Stark. — En la stenografia unuigo „Gabelsberger“ komenciĝis speciala kurso pri nia lingvo.

Memmingen. La kunveno de la esperantista grupo „Unueco“ nun estas „Goldener Bär“. La kunvenoj okazas ĉiumerkrede je la 8^{1,2}a vespere.

Mülhausen en Els. Grandan sukceson havas la ĉi tiea grupo. La nombro de la membroj konstante kreskas. S-ro Baumann, la fondinto kaj la prezidanto de la grupo, finis nun la trian kurson kaj komencos la 1an de Majo novan kurson en publika lernejo, por kiu jam estas anoncigitaj ĉirkaŭe 40 novaj gelernantoj. La en Esperantujo fame konata propagandistino F-ino Charlotte Pulvers el Basel prenis sur sin la gvidadon de alia kurso kun 45 lernantoj. La grupo aliĝis kun 120 anoj al G. E. A. kaj aliĝos ankaŭ al U. E. A. En la lasta monato S-ro Baumann publike parolis antaŭ granda ĉeestantaro pri la temo „Esperanto kaj niaj kontraŭuloj“. La parolado trovis tre dankeman aŭskultantaron. Paroladoj ankaŭ aranĝataj de S-ro Baumann okazos en diversaj ĉi tieaj specialaj societoj.

München. Kelkaj el la tieaj grupoj aranĝis novajn kursojn.

Nowawes. Finiĝis post 15 lecionoj la speciala kurso por instruistoj, naŭ el la partoprenintoj aliĝis al la grupo. S-ro instruisto Hollfeder komencis novan tian kurson.

Nürnberg. Pro la tie la 13an kaj 14an de Majo okazonta kunveno de „Bavara Esperantista Ligo“ la intereso pri Esperanto kreskis rimarkinde. Okazas nun du multnombro vizitataj komencaj kaj du progresigaj kursoj.

Oberstdorf. En la lasta kroniko ni bedaŭrinde erare skribis la nomon de la tiea grupestro, kiu efektive nomiĝas Stockbauer.

Oldenburg i. Grh. La 6an de Aprilo la tiea grupo „Bluruĝa“ festis sian kvaran fondiĝan feston per paroladoj, ŝercoj kaj kantoj. — Kurso finiĝis, ĉiuj partoprenintoj fariĝis membroj de la grupo.

Potsdam. S-ro Prof. Schmidt estas elektita honora prezidanto de la tiea grupo. — S-ro instruisto Markau sukcese parolis en la distrikta unuigo de „Berliner Vorstadt“. — La unuigo por komerco kaj metioj voĉdonis en la lasta kunsido jenan rezolucion: „La Unuigo por komerco kaj industrio“ ekkonas la gravecon de la lingvo Esperanto por komerco kaj industrio kaj bonvenus la baldaŭan enkondukon de tiu ĉi lingvo en la praktikon kiel gravan simpligon de la komerco kaj de la interrilatoj inter la nacioj.“

Reichenau i. Sa. Longa raporto, aperinta en tiea gazeto, pravas la bonegajn sukcesojn, kiujn povas atingi eĉ malgranda grupo per senlaca praktika laboro. La plej nova aranĝo de la tiea grupo estas progresula kurso pri gramatiko, konversacio, komerca korespondo kaj literaturo, kiun gvidas S-roj Schilling kaj Schwarz. S-ro Schwarz krom tio ĵus finis kurson por lernantoj en la najbara Markersdorf.

Seiffhennersdorf. Estas elektitaj vicprezidanto S-ro Grossmann kaj kasisto S-ro Beckel; komenciĝis nova kurso.

Stettin. La societo „Espero“ kunvenas nun ĉiun unuan kaj trian lundon en restoracio „Haasebräu“, Hohenzollernstr. 1.

Stuttgart. S-ro Chilot, Pariza fervojisto, vizitis la grupon kaj estis kondukata de ĝiaj membroj al la vidindaĵoj de la urbo kaj al ĝia ĉarma ĉirkaŭaĵo. Kun aparta ĝojo S-ro Chilot interkonatiĝis kun du samprofesiaĵoj, kiujn li varbis por la „Internacia Fervoj-

ista Asocio". — La grupanaro ekskursis al Möhringen, por renkonti la tie loĝantajn membrojn.

Tilsit. Multnombre la esperantistoj kaj iliaj gastoj ĉeestis la feston de la tiea grupo, dum kiu estis prezentataj deklamoj, teatraĵoj kaj muzikaĵoj.

Weinböhla. La 20 lernejoj, kiuj pasis kurson esperantan ĉe S-ro instruisto Sohrmann, estis publike ekzamenataj; poste sekvis familia kunesto kun la gastoj venintaj el diversaj lokoj, inter kiuj troviĝis ankaŭ S-ino Hankel el Dresden.

Zittau. En hotelo „Goldene Weintraube“ la 27an de Aprilo nova kurso komenciĝis, gvidata de S-ro instruisto A. Semich. H. M.

Gazetaro.

Estas ĝojiga fakto, ke ĉiam pli da ĉiutagaj gazetoj interesiĝas pri Esperanto tiel, ke ili ne nur aperigas artikolojn pri, sed ankaŭ en Esperanto. Al tiuj nun ankaŭ apartenas „Augsburger Postzeitung“, kiu regule esperante raportas pri la „Tutmonda Katolika Unuiĝo“. Espereble la citita gazeto ankaŭ publikigos ĝeneralajn artikolojn en nia lingvo.

La sama ĵurnalo (1. 4.) konigas al siaj legantoj bonegan paroladon de S-ro Dro Richard Ledermann „Der Siegeszug des Esperanto“ (La venkado de Esp.) kiun la oratoro faris la 15an de Marto en Esperanto-Societo Augsburg.

Rilatante al la fondiĝinta „Esperanto-Centro“ en Potsdam, S-ro Profesoro Ad. Schmidt verkis por „Potsdamer Tageszeitung“ (30. 3.) klarigan artikolon, en kiu li pritraktas la celon de internacia lingvo, kiu nur povas esti neŭtrala, artefarita. Precipe la aŭtoro atentigas pri la sukcesoj de Esperanto, kiu ĝis nun estas la sole konsiderinda helpa lingvo.

En „Lippische Landeszeitung“, Detmold (25. 3.) S-ro Profesoro Christaller propagandas por nia lingvo per bone ellaborita pritrakto, en kiu li koncize preparolas la plej gravajn aferojn de la esperanta movado. Interesaj estas el tiu artikolo la jen tradukitaj linioj: . . . „Laŭ germanacia vidpunkto oni riproĉis al Esperanto, ke ĝi estas ne akceptebla por ni germanoj pro sia romana karaktero. Sed estas rimarkinde, ke tiuj, kiuj faras tiun riproĉon, ne ŝanceliĝas uzi multe da fremdaj vortoj, kiuj devenas el la romanlingva teritorio; do la protestoj de tiaj personoj ne estas serioze konsidereblaj. Same rimarkinde estas, ke ekzemple ankaŭ en Francujo estas aŭdeblaj naciaj duboj kontraŭ Esperanto. Sed, se du kontraŭaj partioj rigardas aferon danĝera por si kaj utila por la alia, la malutilo de tiu afero ne povas esti tre granda. Aliflanke, kiam niaj konkurantoj en la popola vivo foje komprenos, ke internacia help-lingvo estas profita por ili, tiam al ni germanoj fine restos nenio pli ol partopreni en la uzado de tia lingvo; tio estas pli honorinda ol lamkuri post kultur-progreso . . .“

La antaŭe cititaj paroloj bone rilatas al „Kölnische Zeitung“, kiu jam kelkafoje mokis pri nia lingvo pro la sama kaŭzo. En la numero de 11. 4., raportante pri la Internacia Ekspozicio por Vojaĝo kaj Turismo en Berlin, ĝi denove esprimas sian opinion pri Esperanto jene: . . . Fine ni mencias eltrovaĵon, kiu ankaŭ estas reprezentata en la ekspozicio, sed al kiu ni, laŭ germana vidpunkto, ne deziras la venkan evoluon de la elektro: Esperanto! Malgranda

ĉambro estas plenigita per libroj, broŝuroj, statistikaj tabeloj kaj kartoj de la tiel nomata mondlingvo. Jam mallonga rigardo en tiun ĉambron, direktita al la grase presita deklinacio de la vortoj „la granda arbo“, devus deteni ĉiujn prudentajn germanojn, fervore labori por miksaĵo el romanaj lingvoj. Por tio estas necese abnegacio, kiu en naciaj aferoj meritis pli akran nomon. Espereble Esperanto kaj ĝiaj jam sufiĉe multnombraj filinoj reciproke sin formanĝegos.“ Ni dankas al „Kölnische Zeitung“ por la bona deziro. Sed la afero estus pli simpla, se K. Z. kaj similaj ŝovinistaj gazetoj mem englutus nian lingvon kun ĝiaj filinoj, tiam per unu fojo la mondo estus purigita de la lingvaj parazitoj kaj la patrujo estus savita. Bonan apetiton! Sed serioze: diskuti kun homoj, kiuj tute ne volas kompreni la celon de helpa lingvo, estas vana klopodo. Pro tio ni lasu al K. Z. ĝian opinion; venos la tempo kiam ĝi estos konvinkata per la praktiko.

„Gross-Lichterfelder Lokal-Anzeiger“ (1. 4.) enhavis noton pri la internacia helpa lingvo Ido, en kiu denove estas ripetitaj la atakoj kontraŭ Esperanto, kiuj jam de du jaroj estas faritaj de la idistoj. Fanfarone oni jam subskribis la noton per la firmo „Deutscher Weltsprache-Bund“ (germana mondlingva asocio), kiu ĝis nun ne ankoraŭ estas fondita! — La prezidanto de la Berlin'a Esperanta Gruparo, S-ro patentadvokato L. Schiff refutis en la numero de 4. 4. la malĝustaĵojn de la artekoleto kaj atentigis speciale pri la esperantaj elmontraĵoj en la Internacia Ekspozicio p. V. k. T., kiuj pli bone ol paroloj pravas la disvastiĝon kaj gravecon de Esperanto.

En „Nachrichten für Stadt und Land“, Oldenburg (Grhzt.) (29. 3.) S-ro D. Popp detale raportis pri vizito kaj parolado de S-ro Rafael Naklé el Kairo en la grupo de Bremen (Komparu Germanan Kronikon). Tiu ĉi interesa raporto estas elmetita en la Ekspozicio por V. k. T., kaj ĝi forte altiras la atenton de la vizitantoj, ĉar S-ro Naklé sole per Esperanto travojaĝas Germanujon.

„Königshütter Tageblatt“ (6. 4.) reprenis la artikolon „Englisch oder Russisch“, kiun S-ro Profesoro Huebner publikigis en „Tägliche Rundschau für Schlesien und Posen“ (vidu G. E. 4, p. 78).

Propagandaj artikoloj aperis en:

„Mülhausener Tagblatt“ (11. 4.): „Kultur und Esperanto“ de S-ro Dro Ernst Kliemke, jam preparolita en G. E. 1910 p. 256.

„Rhein- und Ruhr-Zeitung“, Duisburg (30. 3.); Ektiraĵo el „Rückblick auf das Jahr 1910“, de S-ro Arnold Behrendt, aperinta en G. E. 1/1911.

„Pädagogische Reform“, Hamburg (2. 4.): „Esperanto und die Schule“ (Esp. kaj la lernejo) de S-ino E. Jenckel. Lerte verkita pritrakto pri la utilo de la instruado de nia lingvo en la lernejoj kaj pri la sukcesoj jam atingitaj en tiu rilato.

„Hannoversche Volkszeitung“ (28. 3.): „Katholizismus und Esperanto“, raporto pri la ĝenerala kunveno de la katolika esperanta unuiĝo en Augsburg. (Komparu G. E. 1, p. 9).

„Lübeckische Anzeigen“ publikigas Esperanto-kurson.

„Zentralblatt für den deutschen Reise- und Bäder-Verkehr“ (1. 4.): „Esperanto por la vojaĝo“ de S-ro Arnold Behrendt. Temas pri la utilo de Esperanto dum internaciaj vojaĝoj, ĉu amuzaj ĉu aliaj.

Pri la utilo de Esperanto por la vojaĝo kaj por internaciaj interrilatoj ankaŭ parolas S-ino Klara Schmiedeberg en interesa artikolo: „Billiger und guter Aufenthalt im Auslande“ (malkara kaj bona restado en eksterlando), kiu aperis en la semajna gazeto „Die Deutsche Frau“ (n-ro 13). La aŭtorino

rakontas kelkajn okazojn, en kiuj nia lingvo servis al ŝi kaj aliaj samideanoj kiel interkomprenilo kaj amikiĝilo dum vojaĝoj kaj restadoj en eksterlando. Varme ŝi rekomendas al ĉiuj gevojaĝantoj, antaŭ komenco de siaj vojaĝoj lerni nian lingvon.

Ek.

Internationale Esperanto-Bewegung.

Belgien. Der III. belgische Esperanto-Kongress findet in Charleroi vom 4.—5. Juni statt. — Die Zeitung „Gazette de Charleroi“ veröffentlichte wiederholt Artikel über Esperanto. — Die städtische Volksbibliothek in Antwerpen weist zirka 100 Werke in und über Esperanto auf. — An der höheren Handelsschule ebenda hat ein Kursus für Studenten begonnen.

Bulgarien. In Kjustendil lernen Schüler der landwirtschaftlichen Schule Esperanto. — In Gabrovo hat unsere Sprache unter den Gymnasiasten Anhänger gefunden.

England. In Leicester, Southport, Warrington empfiehlt die Presse unsere Sache, und zwar brachten längere Artikel, teils über, teils sogar in Esperanto „Leicester Pioneer“, „Southport Guardian“, „Warrington Examiner“. In Southport findet in der Pfingstwoche der IV. englische Esperanto-Kongress statt. — „London Evening News“, „Huddersfield Examiner“, „Progress“ (Norwich) brachten ebenfalls Artikel über Esperanto.

Frankreich. In Lyon wird zu Pfingsten ein nationaler Kongress der „Société Française pour la Propagation de l'Esperanto“ stattfinden. — „La vie sportive“ (Toulon) bringt in No. 189 vom 31. Januar einen in Esperanto abgefassten Brief aus Norwegen, in dem der Verfasser in interessanter Weise über die Beziehungen zwischen Schweden und Norwegen berichtet. — „Le Petit Parisien“ vom 4. Februar bringt eine Notiz, laut welcher sich eine Gruppe französischer Parlamentarier gebildet hat, deren Aufgabe wahrscheinlich sein wird, die allgemeine Einführung des Esperantounterrichts in den französischen Schulen auf parlamentarischem Wege zu erreichen. Ein entsprechender Antrag hat bereits im Jahre 1907 vorgelegen. — Das Experiment der Pariser Tageszeitung „Excelsior“ (vergl. S. 57) hat in Frankreich eine wahre Flut von Zeitungsartikeln für Esperanto zur Folge gehabt. — Tristan Bernard, ein bekannter französischer Schriftsteller, hat vor kurzem erklärt, er werde künftig seine Werke nicht mehr in irgendeiner Nationalsprache übersetzen lassen, sondern sie selbst ins Esperanto übertragen; diese Uebersetzung soll dann etwaigen nationalsprachigen Uebersetzungen zugrunde gelegt werden. — „Fervoja Esperantisto“ beginnt in der April-Nummer die Veröffentlichung von fachtechnischen Artikeln. — „Le Capilariste“, das Organ der Friseure Frankreichs, enthält fortan einen Esperantotext über fachtechnische Angelegenheiten.

Italien. Vom 25.—28. Mai wird in Genua der II. Italienische Esperanto-Kongress abgehalten werden. Adresse: Dr. Alfr. Stromboli, Genua, Via Assarotti, 54—15. Das „Liguria Instituto de Esperanto“ (Genua) unterrichtet 170 Kursusteilnehmer. Die städtischen Behörden lassen den Kongressvorbereitungen alle Förderung zuteil werden. — In Florenz wird am Blinden-Institut Esperanto gelehrt. — Die dortige

Handelskammer hat der Esperanto-Gesellschaft eine Geldbeihilfe gewährt. Die Presse zeigt sich unserer Sache geneigt. Grössere Artikel brachten u. a. die theosophische Zeitschrift „Ultra“ (Rom), „La Democrazia“ (Perugia), „Il Piccolo“ (Triest), „La Nazione“, „Fieramosca“, „Il Nuovo Giornale“ (Florenz).

Niederland. Auf den II. Internationalen Kongress katholischer Esperantisten, der vom 14.—18. August in Haag stattfindet, sei auch an dieser Stelle nochmals hingewiesen. (Vergl. S. 58 u. 108). In Niederland besteht bereits eine recht ansehnliche Liga katholischer Esperantisten (etwa 1000 Mitglieder). Ähnliche Verbände bestehen in Deutschland, Frankreich, Spanien, Bulgarien und Belgien; ausserdem besteht seit dem ersten internationalen Kongress katholischer Esperantisten (Paris, April 1910) eine besondere internationale Vereinigung: „Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista“. Besonders für Katholiken bestimmt sind die Blätter: Monatsblätter für katholische Esperantisten; Nederlanda Katoliko; L'Esperantiste Katholique; Espero katolika. — In Haag wird gegenwärtig für 16 Pfliegerinnen des städtischen Krankenhauses ein Esperantokursus abgehalten. Die täglich erscheinende Zeitung „Avondpost“ (Haag) bringt Artikel in Esperanto.

Oesterreich-Ungarn. Die Stellungnahme der Presse in Prag für Esperanto ist bemerkenswert. „Národní Obzor“ (wöchentlich) bringt regelmässig eine Esperantorubrik. Die Tageszeitung „Čas“ brachte mehrere längere Artikel über Esperanto. — Unter Gymnasiasten hat Esperanto neuerdings in Prag grössere Verbreitung gefunden, ebenso in Arbeiterkreisen. — In der Handelsschule in Prostějov nehmen etwa 80 Schüler (Knaben und Mädchen) am Esperantounterricht teil. — Die in Vitkovice erscheinende „České ilustrované noviny“ bringt einen Esperanto-Lehrgang. — An den Industrieschulen für Mädchen in Pisek und C. Budějovice wird Esperanto gelehrt. — In Brünn wird vom 3.—5. Juni eine Feier aus Anlass des zehnjährigen Bestehens der ersten Esperantogruppe in Oesterreich abgehalten werden. — „Cíostudenta asocio“ zählt bereits über 400 Mitglieder in aller Welt. „Gestudentaj Intereso“ erscheint nun gedruckt als offizielles Organ. „Bohema Esperantisto“, Prag, III 495 bittet um Adressen von Esperantisten, die mit böhmischen Gesinnungsgenossen korrespondieren wollen; ebenso Časopis Českých Esperantistu, Prag II, Dittrichova ul. 7. Die Bekanntgabe der Adresse erfolgt in den genannten Blättern kostenlos; man sende Ansichtskarte. — In Prag gibt es gegenwärtig 30 Firmen, bei denen man Esperanto spricht oder in dieser Sprache korrespondiert. — „Vočo de kuracisto“ (Stimme der Aerzte) hat mit der Veröffentlichung der Rundfrage-Antworten über „Teilnahme der Aerzte an Duellen“ begonnen. — „Hungara studento“ gibt die Zahl seiner Abonnenten auf

über 1000 an. — Die Stadt Karlin (Vorstadt von Prag) gewährte der Esperanto-Gesellschaft 100 Kronen.

Russland. Aus dem Drama „Dziady“ des polnischen Dichters Adam Mickiewicz ist von Roman Iwo Dobrzanski ein Teil ins Esperanto übersetzt worden. Nach dem Ausspruch von Sachverständigen übertrifft diese Uebersetzung bei weitem sowohl die russische von Puschkin als auch eine deutsche, die als sehr gut angesehen wird. — Die in Warschau erscheinende Tageszeitung „Dzien“ (Der Tag) bringt dauernd Artikel, die Esperanto betreffen. Bemerkenswert ist, dass diese Artikel gewissermassen eine Chronik über das darstellen, was Esperanto schon heute auf verschiedenen Gebieten leistet. A. Grabowski, der Verfasser dieser Rubrik, weiss das Nützliche mit dem Angenehmen zu verbinden und unterrichtet die Leser über Esperanto in der Praxis. — Auch anderswo in Russland bringt die Presse unserer Sache immer grösseres Interesse entgegen: In Kalisz berichtete „Kurjer Kaliski“ über die Esperantobewegung am Ort während 1910. — In Charkow hat die Presse nach einem von der dortigen Esperanto-Gesellschaft veranstalteten literarisch-dramatischen Abend ihre bisherige skeptische Haltung gegen Esperanto aufgegeben. — Das Blatt „Der Nordwest-Telegraph“ brachte einen sehr eingehenden Artikel über die Esperanto-Ausstellung in Warschau und berichtete in einer späteren Nummer über ein Esperantofest in Kowno. — „Rund um die Welt“, „Das blaue Journal“, „Die Handelswelt“ brachten ebenfalls längere Artikel über Esperanto und seine Anwendung. Die armenische Wochenschrift „Darbin“ bringt einen Esperanto-Lehrgang. — Ueber die Esperanto-Ausstellung in Warschau berichtete ferner „Nasz Kraj Ilustrowany“ in einem durch Illustrationen erläuterten Artikel. — Die in Kowno erscheinenden russischen Blätter „Literaturno-Teatralnyj Kurjer“ (wöchentlich) und „Bjelorusskaja Jiznj“ (täglich) bringen regelmässig Artikel über die Esperantobewegung. — In Tiflis ist das Interesse für Esperanto so gross, dass sich ein Geschäft „Espero“ auftun konnte, das sich besonders mit dem Vertrieb von Esperantobüchern usw. befasst. — In Kielce ist für die Mädchenschule Esperantounterricht eingeführt.

Schweiz. Zu Pfingsten wird in Zürich eine Zusammenkunft schweizerischer Esperantisten stattfinden. In dem genannten Ort ist die Esperantobewegung neuerdings erstarkt und macht nun gute Fortschritte, ebenso in Huttwil. „German-svisa Esperanto-Ligo“ ist gegründet worden. — Adresse für Zürich: K. Jost, Culmannstr. 57.

Spanien. Die bedeutende Handelsgesellschaft „Centre de Dependents del Comers y de la Industria“ in Sabadell hat eine besondere Sektion für Esperantisten unter dem Namen „Komerco-Industri-Esperantista Oficistaro“ gebildet.

Amerika.

Vereinigte Staaten. „United States Esperanto Association“ (Usona Asocio Esperanta) hat sich neuerdings gebildet. Vors.: B. F. Schubert, Washington, D. C., 1505 North Capitol St. — Die Pennsylvanische Universität liess einen Kursus über Esperanto beginnen, der sich einer ansehnlichen Teilnehmerzahl (100) erfreut. — „York Dispatch“ (York, Pa.), „Pittsburgh Sun“, „Theosophic Messenger“ (Pittsburgh, Pa.) veröffentlichen regelmässig Nachrichten über Esperanto.

Das erstgenannte Blatt bringt einen Esperanto-Lehrgang, ebenso „The News“, „The Lakewood Independent“ (Cleveland). — In New-York ist „Internacia Studenta Esperantista Frateco“ gegründet worden. Sekr.: A. S. Arnold, L. L. B. 24. St. Marks Place, New-York, U. S. A. (Vergl. G. E. 3, S. 61).

Asien.

Japan. In Tokio erscheint das bedeutende wissenschaftliche „Journal of the Meteorological Society of Japon“; das Blatt wird jedoch fast ausschliesslich japanisch redigiert, nur selten findet man kurze englische Texte, — richtiger gesagt: fand man bisher. Das Februarheft bringt einen Artikel über „Erdbeben in Turkystan am 4 Januar 1911, beobachtet in Tokio“ von Prof. F. Omori, — und zwar in Esperanto. Die Uebersetzung besorgte T. Saki. — In der japanischen Arbeiterzeitung „Printing Journal“ in Tokio sind die Satzungen des japanischen Arbeiter-Esp.-Vereins in japanischer Sprache und in Esperanto veröffentlicht. Arnold Behrendt.

Esperanto-Verbreitung im Deutschen Reiche

gemäss der dem „Deutschen Esperanto-Bunde, e. V.“ bis Ende März 1911 angeschlossenen Gruppen lt. statist. Erhebungen Jan.-März 1911.*)

Ostpreussen	108 Mitgl.	2 Gruppen
Westpreussen	82 „	2 „
Brandenburg	327 „	12 „
Pommern	54 „	3 „
Posen	68 „	2 „
Schlesien	215 „	7 „
Prov. Sachsen	366 „	16 „
Schleswig-Holstein	30 „	3 „
Hannover	120 „	3 „
Westfalen	57 „	3 „
Rheinprovinz	242 „	9 „
Hessen-Nassau	243 „	5 „
Königreich Preussen	1912 Mitgl.	67 Gruppen
„ Bayern	960 „	22 „
„ Sachsen	1775 „	76 „
„ Württemberg	137 „	4 „
Baden	10 „	1 „
Hessen	55 „	4 „
Mecklenburg-Schwerin	32 „	1 „
Oldenburg	41 „	2 „
Braunschweig	83 „	2 „
Sachsen-Weimar	17 „	1 „
Sachsen-Koburg-Gotha	53 „	2 „
Anhalt	10 „	1 „
Schwarzburg-Sondershausen	25 „	1 „
Reuss jüng. L.	42 „	2 „
Fr. St. Lübeck	179 „	3 „
„ „ Bremen	12 „	1 „
„ „ Hamburg	172 „	3 „
Elsass-Lothringen	148 „	3 „
Konstantinopel	5 „	1 „

5668 Mitgl. 197 Gruppen.

*) Vergl. den Artikel „Esperantista statistiko“ in voriger Nummer, S. 82.

Der Deutsche Esperanto-Bund E. V. hat bis jetzt noch keine Gruppen in:

Mecklenburg-Strelitz,
Sachsen-Altenburg,
Sachsen-Meiningen,
Schwarzburg-Rudolstadt,
Waldeck,
Reuss ä. L.,
Lippe,
Schaumburg-Lippe.

Komuniko de Dro L. L. Zamenhof.

Pri mia rilato al la firmo Hachette.

Antaŭ pli ol tri jaroj kelkaj personoj faris aferon, kiun mi ne povis aprobi. De tiu tempo oni komencis senĉesan serion da atakoj kontraŭ Esperanto kaj kontraŭ mi persone. Dum pli ol tri jaroj mi pacience legis ĉiujn insultojn kaj malverajn akuzojn, kaj mi silentis; verŝajne mi ankaŭ plue silentos, ĉar mi estas tro fiera kaj havas ankaŭ tro malmulte da libera tempo, por defendi min kontraŭ diversaj elpensoj de personoj, kiuj scias tre bone, ke ili diras malveron aŭ prezentas faktojn en malĝusta lumo kaj kiuj post unu refutita malĝustaĵo baldaŭ elŝovus dek aliajn.

Nur pri unu akuzo mi decidis nun doni malgrandan klarigon, ĉar mi konvinkigis, ke tiu akuzo trovis kredon eĉ ĉe personoj bonintencaj. Mi volas paroli pri mia rilato al la firmo Hachette.

Oni penis kredigi, ke Esperanto nepre bezonas reformojn, ke la esperantistoj tion komprenas, sed nur mi pro iaj personaj motivoj kontraŭstaras. Kvankam eĉ nun ankoraŭ oni tion ofte ripetos, la akuzantoj tamen scias tre bone, ke tio estas absoluta mensogo. Ĉiuj komprenas, ke plenan perfektecon de Esperanto neniu dezirus tiel forte kaj sincere, kiel mi, ĝia aŭtoro; ke se troviĝis bonaj homoj, kiuj grandanime prenis sur sin la plibonigon, mi povus esti nur tre danka al ili, kiel patro estus tre danka, se bonaj homoj volus senpage perfektigi kaj feliĉigi lian profunde amatan infanon, la revon de lia tuta vivo. Ĉiuj scias tre bone (ĉar tion distrumpetis miaj akuzantoj mem), ke kelkajn fojojn, kiam mi opiniis, ke venis la ĝusta tempo, por fari revizion de Esperanto, mi mem elpaŝis kiel iniciatanto; (kompreneble, en formo lojala); sed kiam mi konvinkigis; ke tio alportos al nia afero nur malbonon, mi retiris min malgraŭ ke min, neriĉan kuraciston, oni penis allogi per tre granda sumo da mono, kiu permesus al mi tute forjeti mian profesion, vivi tute oportune kaj feliĉe, kiu liberigus min de ĉiuj zorgoj pri la morgaŭa tago kaj pri la estonta sorto de mia familio kaj kiu permesus al mi fordoni min plene kaj ekskluzive al miaj amataj idealoj*).

Ĉar sekve ne al ĉiu oni povas facile kredigi, ke mi kontraŭbatalas reformojn pro persona oportuneeco, tial oni uzas alian rimedon: apogante sin sur iam aperinta famo pri ia mistera kontrakto kun

Hachette, oni skribas en libroj, gazetaj artikoloj kaj privataj leteroj, ke mi rifuzis reformojn tial, ke mi „estas ligita kun la firmo Hachette“. Kun plej senhonta konscienco oni rakontas, ke mi vendis Esperanton al Hachette, ke Esperanto estas monopolo de tiu firmo, k. t. p. . . . Sinjoroj! Se iu el vi iam volis lerni Esperanton, aŭ instrui Esperanton, aŭ eldoni ian verkon en aŭ pri Esperanto aŭ fari ian alian uzon de Esperanto, kaj mi aŭ la firmo Hachette malpermesis al li tion, — li elpaŝu kaj akuzu min publike! Vi scias tre bone, ke la rakontoj pri la venditeco de Esperanto al Hachette estas malnobla mensogo; vi scias tre bone, ke pri la lingvo Esperanto ĉiu el vi havas tute kaj plene tiujn samajn rajtojn, kiujn havas mi aŭ la firmo Hachette; vi konas tre bone la „misteran kontrakton“, ĉar mi neniam faris el ĝi ian sekreton. Pri tiu kontrakto mi povus rakonti al vi kelkajn interesajn aferojn, se mi volus imiti la agadon de niaj kontraŭuloj kaj nigrigi personojn, nur pro tio, ke ili apartenas ne al nia partio. Nun mi nur ripetos al vi tion, kion ĉiuj scias, t. e. la tuta terura, mistera kaj krima kontrakto konsistas sole kaj ekskluzive nur en tio, ke miajn personajn librojn (ne gazetajn artikolojn aŭ ion similan, sed ekskluzive nur librojn) mi promesis publikigi ĉiam per la firmo Hachette!*)

Jen estas mia tuta krimo! Eĉ se tiu kontrakto prezentus por mi ian oportunajon, — kiu havas la rajton akuzi min pri tiu afero, kiu estas ja mia afero pure persona kaj neniam tuŝas Esperanton nek la esperantistojn? Sed miaj akuzantoj scias tre bone, ke la kontrakto (kiu ligas nur min, sed neniam ligas la firmon) tute ne estas ia oportunaĵo por mi, ke longe mi ne volis ĝin subskribi, ke se mi fine ĝin subskribis, mi faris tion ne pro mia profito, sed nur por fari servon al Esperanto, kiu tiam tre bezonis la apogon de ia solida firmo. Sekve se ekzistas en la mondo iu, kiu havas la rajton plendi pri tiu kontrakto, tio estas nur mi, mi sola. Sed mi ne plendas, ĉar mi scias tre bone, kiajn grandajn servojn la firmo alportis al nia afero.

Oni diras, ke Hachette pagis al mi por mia kontrakto ian grandan sumon da mono; oni diras, ke mi ricevas procenton de ĉiuj eldonoj de Hachette, ke mi sekve havas intereson zorgi pri la profitoj de la firmo, k. t. p. Cio ĉi tio estas malnobla mensogo. Kiel al ĉiu alia aŭtoro, tiel ankaŭ al mi Hachette pagas nur por miaj personaj verkoj; sed neniam mi prenis de Hachette ian apartan pagon, ian donacon aŭ salajron; de la libroj eldonataj de Hachette, se ili ne estas verkitaj de mi mem aŭ kun mia kunlaborado kaj ne portas malkaŝe mian propran nomon, mi neniam ricevas eĉ unu centimon. Eĉ kiam por miaj propraj verkoj (presataj en la „Revuo“) Hachette en la komenco difinis al mi tro grandan pagon, kiujn la enspezoj de la „Revuo“ ne povis kovri, mi baldaŭ poste per mia propra volo tion rifuzis (simple pro

*) Estas al mi tre malagrabla tuŝi tiun historion, pri kiu mi nun la unuan fojon parolas publike. La legantoj pardonu min, ĉar la cirkonstancoj devigas al mi tion fari. La propono de la mono ne estis ia malnoblaĵo de la flanko de la proponintoj, ĉar ili havis la plej bonan intencan; mia rifuzo ne estis ia heroaĵo de mia flanko, ĉar agi alie mi ne povis. Tial mi al neniu parolis pri tiu afero, kaj la unuan fojon mi rakontis pri ĝi private kaj nur unu jaron post la fakto, kiam oni faris al mi riproĉon, ke mi estas konservativa „pro financaj motivoj“.

*) La rakontoj pri tio, ke mia kontrakto malpermesas al mi publikigi artikolojn en aliaj gazetoj krom la „Revuo“, estas simple fantaziaĵo. Mi promesis al la direktoro de la „Revuo“ (libere, sen ia kontrakto), ke mi en ĉiu numero de lia organo publikigos parton de miaj tradukoj; sed mi neniam promesis al li (kaj tion li ankaŭ neniam diras) publikigi artikolojn nur en lia organo. Kiu el vi povas kun pura konscienco akuzi min pro tio, aŭ kiu el vi iom suferas de tio, ke en la tre malmultaj horoj, kiujn mi devus uzi por ripozo aŭ por mia familio, mi faras tradukojn por la „Revuo“, kiu pagas al mi por tiuj tradukoj kaj per tio donas al mi la eblon plibonigi la vivon de mia familio kaj venadi ĉiujare al la kongresoj?

tio, ke mi ne volas esti ies morala ŝuldanto) kaj mi postulis, ke Hachette prenu al si la rajton eldoni tiujn verkojn senpage en formo de libroj en tia nombro da ekzempleroj, ke ĉiuj elspezoj kovriĝu.

Kion do suferas la Esperanta afero de mia fama pure persona kontrakto? Per kio ĝi povas influi la iradon de la Esperanta afero? Se mi volus akcepti reformojn, fari tian aŭ alian agon, skribi tian aŭ alian artikolon, — per kio Hachette povus min malhelpi aŭ influi? Se mi dezirus publikigi ian libron, kiu ne estus oportuna por Hachette, la firmo havus nur la rajton ne eldoni ĝin. neniom pli; sed ĉiuj scias, ke tiam mi ja tre facile trovus alian firmon, kiu eldonus mian libron kun granda plezuro.

Miaj kontraŭuloj scias tre bone, ke se mi volus aliĝi al la reformistoj, ne sole neniu kaj nenio povus min malhelpi, sed mia situacio tiam estus multe pli bona, ol nun. Se ili, ĉion sciante, tamen rakontas al la mondo, ke mia sintenado en la reforma afero estas kaŭzita de mia „ligiteco kun la firmo Hachette“ — ilin juĝu ilia propra konscienco.

L. L. Zamenhof.

(El „Oficiala Gazeto Esperantista“,
Febr. 1911).

Konstanta Komitato de la Kongresoj.

Laŭ la peto de Dro Zamenhof, tiu ĉi propono estis prezentita al la anoj de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, kaj principe aprobata de ili. Sekve oni preparos elektadon de delegitoj, laŭ la maniero montrita de la projekto, kaj tiuj delegitoj povos, kred-eble, diskuti kaj voĉdoni, en la Sepa Kongreso, pri la tuta afero. La tekston de kelkaj proponoj, kiujn Dro Zamenhof intencas prezenti al la kunveno de delegitoj, ni publikigos en venontaj numeroj de „Oficiala Gazeto“.)

Propono de Dro Zamenhof pri la organizo de niaj Kongresoj.

Internacia esperantista kongreso estas antaŭ ĉio festo de la esperantismo kaj propaganda manifestado. Sed krom tio ĝi havas (aŭ almenaŭ devus havi) ankoraŭ alian tre gravan rolon: diskuti kaj decidi pri ĉiuj demandoj, kiuj koncernas nian tutan aferon kaj ne povas esti solvataj de apartaj personoj, societoj aŭ institucioj esperantistaj.

Ĉiu esperantisto estas homo libera, kaj neniu havas la devon partopreni en ia komuna esperantista entrepreno; sed la plimulto de la esperantistoj havas la deziron tion fari, ĉar ili konscias tre bone, ke Esperanto prosperos nur tiam, kiam ni laboros kune; tial apartaj personoj kunigas en grupojn kaj societojn, kaj la grupoj kaj societoj devas interkomunikiĝi, por preparoli kaj aranĝi entreprenojn komunajn. Tiel longe, kiel ni tion ne havos, ni ĉiam estos tute senfortaj, ĉar ĉiufoje, kiam aperos la neceso fari ian laboron komunan, troviĝos neniam plenumantoj; ĉiu aparta

*) Ni uzas la okazon por denove atentigi niajn legantojn pri la graveco de la „Oficiala Gazeto“, kies legadon ni insiste rekomendas. Ĉiu esperantista grupo devus aboni almenaŭ unu ekzempleron de la oficiala organo, por ĉiam esti informita pri la komunikoj kaj decidoj de la Akademio, Lingva Komitato kaj la aliaj fakaj komitatoj. En la marta numero de O. G. E. Dro Zamenhof komencis daŭrigi la lingvajn respondojn, laŭ sia promeso donita en la Kongreso de Washington. Ankaŭ pro tio la oficiala organo estas vere interesa kaj leginda. Pro abonoj oni turnu sin al la administracio, 51 rue de Clichy, Paris.

persono aŭ societo diros: „mi estas tro malforta aŭ ne sufiĉe aŭtoritata“, aŭ: „mi ne volas labori sola por la tuta esperantistaro, ĉar eble oni povus rekompenci min nur per atakado aŭ nekomprene de miaj bonaj intencoj“. Se ni ne volas esti tute senfortaj, la esperantistaj grupoj kaj societoj devas en orda maniero, per rajtigataj delegitoj, periode preparoli kaj aranĝi ĉiujn necesajn komunajn entreprenojn. La plej bonan rimedon por tio prezentas niaj internaciaj kongresoj.

Ĉar ĉiu esperantisto estas homo libera, neniu havas ankaŭ la devon alkonformigi sin al la volo kaj opinio de ĉiuj aliaj esperantistoj (se li ne nur ŝanĝas la lingvon laŭ sia bontrovo kaj ne perdas per tio la rajton sin nomi esperantisto); sed la plimulto de la esperantistoj havas la deziron alkonformigi sin al la volo kaj opinio de ĉiuj aliaj, ĉar ili konscias tre bone, ke nia afero postulas antaŭ ĉio plenan unuecon kaj Esperanto progresos nur tiam, kiam siajn proprajn kapricojn, dezirojn aŭ opiniojn ĉiu esperantisto submetos al la deziro kaj opinio de la plimulto. Tial estas necese, ke pri ĉiu aperanta demando ni havu la eblon scii la veran opinion de la plimulto. Tiel longe, kiel ni tion ne havos, al ni ĉiam minacos anarĥio, ĉiam troviĝos personoj, kiuj diros, ke nur ilia opinio estas la opinio de la plimulto kaj ke ĉia alia opinio estas nur maljusta altrudo aŭ provo de regado. Se ni deziras, ke la Esperantistoj laboru en plena unueco, ni devas, de tempo al tempo, en orda maniero, ankaŭ per rajtigataj delegitoj, esplori kaj publike klarigi pri diversaj aperantaj demandoj la deziron kaj opinion de la plimulto, kaj por tio ankaŭ la plej bonan rimedon pretentas niaj internaciaj kongresoj.

Bedaŭrinde ĝis nun niaj kongresoj ne povis plenumi sian agadan rolon, ĉar ili ne estis organizitaj kaj ne havis la eblon aranĝi aŭtoritatan voĉdonadon. Ni povis decidi nur pri demandoj plej malgravaj, kiujn oni povis solvi per aklamoj; pri ĉio pli grava, pri kio la opinioj ne estis egalaj, ni nenion povis decidi, ĉar niaj decidoj, faritaj ne de orde elektitaj delegitoj, havus nenan valoron en la okuloj de la Esperantistoj.

Por meti finon al tiu stato kaj doni al niaj kongresoj la eblon labori kun klaraj rezultatoj, mi proponas, ke oni enportu la malsupre donitan aldonon en la regularon de niaj kongresoj.

Ĉar ni ne havas ankoraŭ ian aŭtoritatan institucion, kiu povus pli rajte decidi pri mia propono, tial mi prezentas mian proponon al la Konstanta Komitato de la Kongresoj. Se ĝi aprobas mian proponon, tiam mi petas, ke ĝi publikigu sian decidon kiel eble plej baldaŭ en la „Oficiala Gazeto“, por ke al la Antverpena Kongreso ĉiuj esperantistoj povu jam partopreni laŭ la nova ordo.

L. L. Zamenhof.

Aldono al la Regularo de la Universalaj Kongresoj de Esperanto.

1. Ĉiu decido de Internacia Esperantista Kongreso estas deviga nur por la komunaj Esperantistaj Institucioj oficialaj, tio estas por tiuj, kiuj estas kreitaj kaj subtenataj de la tuta Esperantistaro. Por la Esperantistoj privataj ĝi havas valoron nur moralan, montrante al ili la deziron aŭ opinion de la plimulto.

2. Partopreni en la Kongreso kaj en ĝiaj diskutoj havas la rajton ĉiu, kiu pagis la kotizon kaj submetiĝas al la kongresa Regularo; sed rajton de voĉdonado

havas nur la regule elektitaj delegitoj de Esperantistaj grupoj aŭ societoj.

3. Kiel delegito estas rigardata ĉiu persono, kiu prezentas al la Kongresa Komitato rajtigan leteron, kiun, en la nomo de la grupo aŭ societo, subskribis ĝia prezidanto kaj ne malpli ol 25 membroj.

4. Grandaj grupoj aŭ societoj povas elekti po unu delegito por ĉiuj 25 membroj, malgrandaj grupoj aŭ izolitaj esperantistoj povas, por elekto de delegito, kunigi kun aliaj grupoj. Sed neniu havas la rajton doni sian subskribon pli ol por unu elekto.

5. Ĉiu grupo povas elekti siajn delegitojn aŭ inter siaj propraj membroj, aŭ inter aliaj Esperantistoj, kiuj partoprenos en la Kongreso. Ĉiu delegito havas tiom da voĉoj, kiomfoje po 25 anoj havas la grupoj aŭ societoj, kiujn li reprezentas.

6. La tagordon de la Kongreso fiksas la Prezidanto de la Konstanta Kongresa Komitato post interkonsiliĝo kun la aliaj anoj de tiu Komitato, kaj li publikigas ĝin du monatojn antaŭ la Kongreso en la Oficiala Gazeto, por ke ĉiuj societoj kaj grupoj havu la eblon esprimi al siaj delegitoj sian opinion pri la diskutotaj demandoj.

Se ia propono ne estas akceptita en la tagordon, ĝia aŭtoro havas la rajton disdoni ĝin dum la Kongreso al la delegitoj de la Kongreso, kaj se ne malpli ol 20 delegitoj subskribas ĝin kiel diskutindan, la Kongresa Komitato devas enporti ĝin en la tagordon.

7. Ĉi tiu projekto estas nur provizora. En la Antverpena Kongreso la rajtigotaj delegitoj diskutos kaj voĉdonos pri ĉiu paragrafo aparte kaj faros en la projekto ĉiujn ŝanĝojn, kiuj montriĝos utilaj.

(El „Oficiala Gazeto Esperantista“
Februaro 1911).

Richtigstellung.

Im „Germana Esperantisto“ 1911, No. 4, Seite 78 wird in einer Notiz die Neutralität der von Prof. Dr. Ostwald angeregten und von einem bernischen Initiativkomitee aufgenommenen Bestrebungen zur Gründung eines Weltsprache-Amtes angezweifelt.

Als weltsprachlich ganz neutrales Mitglied des genannten Initiativ Ausschusses und Verfasser des ersten gedruckten Aufrufes (ich bin weder Idist noch Esperantist, noch Angehöriger einer andern Sprachgruppe) erlaube ich mir eine Richtigstellung jenes Artikels.

Vorerst ist unzutreffend, dass der erst am 27. Februar 1911 geschaffene Verband zur Gründung eines Weltsprache-Amtes die Stadt Bern als Sitz desselben bezeichnet habe; die Sitzfrage wird selbstverständlich erst durch eine offizielle internationale Konferenz gelöst werden können.

Im übrigen sodann begnüge ich mich mit der Anführung weniger Tatsachen, die unwiderleglich dartun, dass der Verband gegenüber den bestehenden und später noch auftauchenden Hilfs-Sprach-Systemen durchaus neutral ist, — woran auch der Angesichts der Person des Hauptinitianten ganz natürliche Umstand nichts ändert, dass einige bekannte Idistenführer dem Initiativkomitee angehört haben.

1. An der konstituierenden Versammlung vom 27. Februar 1911 haben auf spezielle Einladung hin

(ausser einer grossen Mehrzahl hilfssprachlich ganz neutraler Männer und einiger Idisten) auch teilgenommen: ein Volapükianer und zwei Esperantisten, die HH. Jos. Feierabend, Gründer des Esperanto-Vereins Bern und gewesener Kassierer des Schweizer Esperanto-Vereins, und Jak. Schmid, Sekretär des Schweizer Esperanto-Vereins. Der letztere ist von mehreren Seiten zum Sekretär vorgeschlagen worden, hat aber die Wahl abgelehnt. Das Protokoll über die Verhandlungen fusst auf seinen Notizen.

2. Das am 14. November 1910 gebildete kleine Initiativkomitee, zu welchem allerdings kein Esperantist, jedoch mehrere frühere Esperantisten gehört haben (immerhin hat ein solcher einer Sitzung beigewohnt), war insgesamt nur in drei Sitzungen zusammengekommen. Jedesmal gaben die Anwesenden einhellig der Meinung Ausdruck, dass auch die Esperantisten und Vertreter anderer Hilfsprachen zur Mitarbeit eingeladen werden sollen, sofern sie überhaupt ernsthaft mitzuarbeiten wünschen. Das Gleiche ist vom Unterzeichneten einem bekannten Vertreter des Esperanto, Herr Fürsprecher Eugen Stettler in Genf, Vize-Direktor der U. E. A., anfangs Dezember 1910, anlässlich einer Interpellation über die Absichten der Initianten ausdrücklich erklärt worden. Dem bekannten Esperantisten Jak. Schmid ist unterm 23. Februar 1911 vom Initiativkomitee brieflich erklärt worden, dass der Verband, seinem Grundsatz strikter Neutralität gemäss, selbstverständlich auch die esperantistische Organisation begrüssen werde. Bis jetzt ist überhaupt keine der bestehenden Sprachorganisationen als solche vom Verband begrüsst worden.

3. Der bis jetzt gewählte Vorstand des Verbandes hat erst eine einzige Sitzung gehabt, in welcher bereits der allgemeine Wunsch zum Ausdruck gekommen ist, dass aus den Kreisen der Esperantisten und anderer Weltsprachevertreter weitere Vorstandsmitglieder gewonnen werden sollen. Der Vorstand setzt sich übrigens in seiner grossen Mehrheit aus sprachlich durchaus neutralen Herren zusammen; die bisherigen Mitglieder wohnen mit drei Ausnahmen in Bern, wo der Verband ins Handelsregister eingetragen werden soll. Doch wird der Vorstand noch ergänzt werden. Die Sache befindet sich ja überhaupt noch ganz im Anfangsstadium. Die Arbeit kann erst beginnen, wenn der neue Aufruf versandt werden kann. Also gedulde man sich noch etwas.

4. Der Grundsatz der sprachlichen Neutralität ist nicht nur im ersten gedruckten Aufruf (der nun durch die Verhältnisse überholt und darum nicht mehr weiter verbreitet worden ist), sondern auch in den Statuten des Verbandes zum unzweideutigen Ausdruck gekommen, die mit dem neuen Aufruf zusammen, sofort nach ihrer Annahme, verbreitet werden sollen. Wer ehrlich an der vom Verband gesetzten Aufgabe mitarbeiten will, ist uns willkommen, er möge nun zu dieser oder jener Sprachgruppe gehören. Dagegen wollen wir keinen unfruchtbaren Sprachenstreit innerhalb des Verbandes. Die Wahl oder allfällige Neuschaffung der später offiziell anzuerkennenden Weltsprache gehört deshalb nicht zum Programm des Verbandes, wie es im ersten Aufruf eventuell in Aussicht genommen war — (d. h. auch dort nur mit Hilfe

einer neutralen Expertenkommission), sondern bleibt der von den Staaten einzuberufenden internationalen Konferenz oder der von derselben bestellten Expertenkommission vorbehalten. Warte man ruhig und objektiv die öffentlichen Einladungen zum Eintritt in den Verband ab, bevor man, auf unkontrollierbare Zeitungsnachrichten hin, mit Vorurteilen das Publikum irreführt.

Bern, 15. April 1911. Hochachtend

Arist Rollier, Untersuchungsrichter.

(Mitglied des Initiativkomitees und des Vorstandes des Verbandes zur Gründung eines Weltsprache-Amtes.)

* * *

Wir zweifeln keineswegs an den obigen Ausführungen des Herrn Einsenders, können uns aber trotzdem des Eindrucks nicht erwehren, dass in der ganzen Angelegenheit noch viele unaufgeklärte Punkte vorhanden sind. Wenn das zu schaffende Sprachamt durchaus neutral sein soll und wenn man auch weitere Esperantisten dazu einladen will, warum wird das nicht klar und deutlich in den Zeitungsartikeln ausgesprochen? Die Nachrichten, die uns über das Sprachamt in die Hände gelangt sind, sprechen fast ausschliesslich nur von der Förderung der Hilfssprache Ido durch das Amt. Infolgedessen konnten wir auch keine andere Ansicht über die Angelegenheit haben, als wir sie in der vorigen Nummer des G. E. zum Ausdruck gebracht haben. Ohne Zweifel nutzen die Idisten die Sache zu ihren Gunsten aus, indem sie derartige Notizen, die nach Aussage des Herrn Rollier nicht zutreffend sind, in die Welt setzen. Es wäre darum empfehlenswert, wenn der Herr Einsender auch nach jener Seite hin gegen die Verbreitung unrichtiger Zeitungsnachrichten protestieren würde.

Da der Stein nun einmal ins Rollen gekommen ist, so wollen wir auch völlige Klarheit in der Angelegenheit des Sprachamts haben. Leider war es uns nicht möglich, in kurzer Zeit das erforderliche Material zu beschaffen. Wir werden aber hoffentlich schon in der nächsten Nummer eine ausführliche Darstellung der ganzen Sache geben können. G. E.

Rezultato de la konkurso de l'Esperantista Poŝkalendaro 1911.

La partopreno en tiu ĉi konkurso ne estis tre granda rilate al la venditaj ekzempleroj. Entute alvenis 80 solvoj, el kiuj unu estas ne valora, ĉar ĉiuj kvar enigmoj estas parte malguste, parte tute ne solvitaj.

Jen la nomoj de la ceteraj konkursintoj, kiuj sendis ĝustajn solvojn:

a) de ĉiuj kvar numeroj: Referendario Arntz, Godesberg; W. Basset, Neustettin; J. Bunzl, Prag; Dipl.-Ing. C. van der Corput, Berlin; W. Daum, stud. phil., Gommersheim; A. Ivanickij, St. Petersburg; Th. Kempe, Radebeul; K. Kozel, Weikersheim; Emil Markau, Potsdam; E. Momber, Oberdollendorf; K. Neye, Potsdam; F-ino H. Nickel, Potsdam; Th. Oster, Godesberg; H. Pfaff, Worms; Ch. Pfeufer kaj Ed. Pfeufer, Augsburg; F-ino Paula Raabe, Görlitz; F-ino Irenjo Robicsek, Budapest; J. Schmalzl, Augs-

burg; Franz Schoofs, Antwerpen; E. E. Ward, Hanley-Anglujo; Ernst kaj Otto Wichert, Charlottenburg; R. Wohlstadt, Berlin;

b) de numeroj 1, 2 kaj 4: Fedor Blume, Chemnitz; P. Brabler, Kunštát-Moravio; J. Friedrich, Olomouc-Moravio; Jaroš V., Wien III; Ad. Neumann, Nymburk-Bohemujo; H. Stahl, Marburg a. L.; B. Stein, Nymburk-Bohemujo; F. Tejkal, Wien XIV; J. Vosecky, Wien; F. Weiss, Donauwörth;

c) de numeroj 1, 3 kaj 4: Igor Ašešov, Nijnij-Novgorod-Rusujo; Richard Brüggemann, Berlin; J. W. Eggleton, Haubinda Sa.-M.; N. E. Pestov, Nijnij-Novgorod-Rusujo; B. F. Schubert, Washington; Fritz Thieme, Dresden; Adalbert Trum, Reisachanger i. B.; Jos. Zehetbauer, Prading i. B.;

d) de numeroj 2, 3 kaj 4: H. Böning, Stuttgart; A. Farnik, Prag; E. Hummel, Ludwigsburg; lernanto A. Kindermann, Prag; Harry Kuebler, Ludwigsburg; Ferd. Pfeil, Dipl.-Ing., Ludwigsburg; Max Wanner, Ludwigsburg; Esperantista Grupo, Ludwigsburg;

e) de numeroj 1 kaj 4: H. Ader, Zweibrücken; E. Bauerfeld, Halberstadt; A. Juhnevič, Vilno-Rusujo; J. Obrucev, TomskSiberio; A. Tinjakov, Taurido-Rusujo; G. Wirenius, Dresden; Heinr. Woder, Zweibrücken i. Pf.;

f) de numeroj 2 kaj 4: F. Chmel, Olmütz-Moravio; M. Deutschmann, Frankfurt a. M.; L. Diguët, La Roche s. Yon; Erfurt, Ing., Colmar i. Els.; O. Funke, Altona a. E.; A. Grosenthal, Imafer-Livlando; Wilhelm Hölscher, Aachen; H. Kach, München; Pro. Kamilo, Baumgartenberg-Aüstrijo; A. Messmer, Frankfurt a. M.; F. W. Nather, Görlitz; Johann Roth, Frankfurt a. M.; A. Schilling, Reichenau i. Sa.; Josef Zosel, Grossschönau i. Sa.; E. Zyv, Lemberg-Aüstrijo;

g) de numeroj 3 kaj 4: A. Hache, Dresden; A. Zajceb, St. Petersburg;

h) de numero 4: J. Bredehoeft, Bremen; H. Bronstejn, Varsovio-Polujo; F-ino Luisa Deeke, Ballenstedt i. A.; Arno Janečka, Vitkovice-Aüstrijo; Wilh. Neurath, Wernigerode-Harz; Georgi Valev, Pleven-Bulgarujo.

Gajnitaj per loto estas:

la 1a premio: M. 30,— de S-ro E. E. Ward, Hanley-Anglujo,

la 2a premio: M. 20,— de S-ro C. van der Corput, Berlin NW.,

la 3a premio: M. 10,— de S-ro Christian Pfeufer, Augsburg,

la 4a—13a premioj: librojn en valoro de M. 4,— de: S-ro Referendario Arntz, Godesberg; S-ro W. Daum, stud. phil., Gommersheim; S-ro J. W. Eggleton, Haubinda Sa.-M.; S-ro A. Farnik, Prag; S-ro Josef Friedrich, Veomouc-Aüstrijo; lernanto A. Kindermann, Prag; S-ro Heinr. Pfaff, Worms a. Rh.; S-ro Jos. Schmalzl, Augsburg; S-ro J. Vosecky, Wien XV; S-ro Otto Wichert, cand. phil., Charlottenburg.

Das „Suĉsigno“, ein praktisches Propagandamittel!

Den Aufschwung, den Esperanto namentlich in den letzten Jahren genommen hat, verdankt es der intensiven und unermüdbaren Propaganda einer immer grösser werdenden Schar von Esperantisten. Wie auf allen anderen Gebieten der menschlichen Tätigkeit, so kann man auch bei Esperanto beobachten, wie

ausserordentlich verschieden sich die Menschen je nach ihren Anlagen, Fähigkeiten, Temperament und Neigungen verhalten. Gewiss mögen wohl alle, die Esperanto lernen und sich genügende Kenntnisse aneignen, den Wunsch haben, dass Esperanto allenthalben gesprochen wird; aber bei den allermeisten bleibt es bei diesem Wunsche. Sie selbst sind weder willens noch in der Lage, zur Ausbreitung der Hilfsprache viel beizutragen. So mancher versucht schüchtern hier und dort in Bekanntenkreisen für Esperanto zu werben, aber jeder Spott entwarfnet ihn, er schweigt still, sich lediglich mit dem Bewusstsein tröstend, dass er es besser wisse, und dass er selbst durch den Ankauf von Esperantoliteratur, durch Zahlung seiner Beiträge und Gaben für die Propaganda und auf andere stille Weise für die Verbreitung von Esperanto sorgt. Ein anderer ist schriftstellerisch tätig, er macht Übersetzungen oder Originalwerke und trägt auf diese Weise zur Bereicherung der vorhandenen Literatur und damit auch der Propagandamittel bei. Ein dritter wieder sucht durch öffentliche Vorträge oder in Vereinen für Esperanto zu wirken, ein vierter schreibt grössere Artikel für Tages- und Fachzeitungen, ein anderer wiederum versendet kleine Notizen an die Presse; kurz und gut, man kann sagen, dass viele Wege nach Rom führen und dass Esperanto desto rascher fortschreitet, je mehr arbeitsteilig nach verschiedenen Richtungen hin gewirkt wird. Es gibt also auch beim Esperanto kein Allheilmittel. Das eine Propagandamittel passt hier, das andere dort.

Zweck dieses Artikels ist es nun, auf ein Propagandamittel aufmerksam zu machen, über das zwar bereits schon der Erfinder, unser samideano Eduard Diemer aus Köln-Ehrenfeld, auf dem Kongress in Barcelona Bericht erstattet hat, das aber bedauerlicherweise noch lange nicht so bekannt ist, wie es verdient. Dies ist auch nicht zu verwundern. Es vergessen eben die meisten Esperantisten, auch nur zu häufig die Verleger und Hersteller von Esperantowaren, dass die Esperantoarmee immer stärker anwächst und ihr Personen zugeführt werden, die von dem, was vor wenigen Jahren geschehen ist, gar keine Kenntnis besitzen. Es muss also immer und immer wieder auf die dem alten Esperantisten längst bekannten Einrichtungen aufmerksam gemacht werden.

Worin besteht nun das Diemersche Propagandamittel und welchen Zweck verfolgt es? Jeder Esperantist, der öfters Gelegenheit hat, vielleicht sogar genötigt ist, Reisen zu unternehmen, weiss, dass sich ihm im Bahnkupee sehr oft gerade günstige Gelegenheit bietet, für Esperanto zu werben. Die Mitreisenden freuen sich mitunter, über die Langeweile der Fahrt durch eine Unterhaltung hinweggebracht zu werden, und der Propagandist ist in der Lage, in Hin- und Widerrede die geäusserten Einwände und Bedenken zu zerstreuen und wirksam für Esperanto tätig zu sein und ihm neue Freunde zuzuführen. Als selbstverständlich sehe ich dabei an, dass jeder reisende Esperantist stets Propagandamittel in seiner Tasche mit sich führt: Flugblätter und dergleichen! Aber mitunter gelingt es nicht, eine Unterhaltung anzuknüpfen oder sie auf Esperanto überzuleiten. Da ist nun gerade das *suĝigno* des Herrn Diemer ein vorzüglich geeignetes Mittel. Namentlich in D-Zügen

ist es, wie ich aus Erfahrung bestätigen kann, ausserordentlich geeignet, um die erforderliche Anknüpfung zu schaffen. Es besteht nämlich aus einem Esperantostern, etwa 7 cm breit und 8 cm lang, aus einer emailähnlichen Masse, und dieser Stern ist befestigt an einem ausgehöhlten Gummipfropfen, der sich durch einen leisen Druck, am besten nach Befeuchtung, an Glas wie überhaupt an jeder glatten Fläche festsaugt und sich lange Zeit, Tage, Monate, daran festhält. Hängt nun ein solcher Stern am Fenster nach der Bahnhofsseite, so dient er als Erkennungszeichen für etwa auf dem Bahnhofe sich befindende Esperantisten. Hängt er dagegen an der Gangseite, so bleibt während der Fahrt mehr als einer neugierig vor diesem Zeichen stehen und bietet so die willkommene Gelegenheit, ein Gespräch anzuknüpfen etwa mit der Bemerkung:

„Sie wundern sich, was dieses Zeichen bedeutet; haben Sie noch nie von Esperanto gehört usw.“

Ich selbst habe auf der Fahrt von Barcelona nach Paris trotz meines recht mangelhaften Französisch mit Hilfe des von Herrn Diemer erhaltenen *suĝigno* manches Gespräch angeknüpft und manchen Franzosen für Esperanto interessiert. Aber selbst dann, wenn man in ein Gespräch nicht kommt, so zieht doch das *suĝigno* die Aufmerksamkeit vieler auf sich. Man hört Bemerkungen von Vorübergehenden und hört Gespräche mit an, aus denen hervorgeht, dass die eine Person, die schon etwas von Esperanto gehört hat, eine andere über die Bedeutung aufklärt. Reisen nun gar z. B. bei Ausflügen mehrere Esperantisten zusammen und sie schmücken die Fenster mit mehreren solcher Zeichen aus, so treiben sie damit eine stille wirksame Propaganda für Esperanto. Ganz besonders ist natürlich dieses Zeichen für Reisen nach und von Esperantokongressen zu empfehlen. Denn wenn auch jeder Esperantist auf Reisen seinen Stern in der Gestalt einer Schlipsnadel oder einer Brosche oder sonstwie am Kleide tragen soll, so entgehen diese Zeichen doch leicht der Aufmerksamkeit, und vor allem sind sie nur auf ganz nahe Entfernung sichtbar. Dem Esperantisten aber, der einen Zug besteigen will, fällt sofort das Zeichen am Fenster auf und er weiss, dass er in dem betreffenden Abteil Esperantisten trifft. Dass auch dieses Zeichen sich in manch' anderer Weise verwenden lässt, z. B. von Ladeninhabern zum Anheften in den Schaufenstern, als Zeichen, dass in dem Laden Esperanto gesprochen wird, bedarf weiter keiner Erwähnung. Der Hauptwert dieser Zeichen liegt jedoch in der Verwendung als Propagandamittel auf der Reise. Der Preis ist dabei ein äusserst mässiger. Die Geschäftsstelle des Deutschen Esperanto-Bundes, Bromberg, Neuer Markt 8, hat einen grösseren Posten dieser *suĝignoj* angeschafft und gibt dieselben an Ortsgruppen oder Einzelmitglieder zu folgenden Preisen ab:

Bei Bezug von 100 Stück das Stück 20 Pf.

„ „ „ 10 „ „ „ 30 „

„ „ „ 1 „ „ „ 40 „

Dazu kommen noch die Versandkosten.

Andere Esperantisten erhalten die Zeichen gegen einen Zuschlag von 10 Pf. zu obigen Preisen.

Wir hoffen daher, dass infolge dieser Mitteilung Hunderte, ja Tausende dieser Zeichen von uns bezogen werden. Denn man darf auf Grund der Erfahrungen, die jeder, der diese Zeichen bisher benutzte,

gemacht hat, behaupten, dass man mit einem solchen Zeichen jährlich mindestens 10 neue Esperantisten unserer Sache zuführen kann. Darum sollte kein Esperantist, dem an der schnellen Ausbreitung für Esperanto gelegen ist, verabsäumen, sich ein oder mehrere solcher Zeichen für die Sommerreise zuzulegen!

K

Ardenaj Landoj.

(Ironte al la Sepa.)

Ĉiujare, kiam la libertempo estas veninta, vi forlasas vian hejmon, kaj vi iras al la plej belaj regionoj, ĉu marbordoj, ĉu montoj.

Viaj pulmoj bezonas pleniĝi per alia aero, viaj okuloj deziras vidi aliajn panoramojn; viaj oreloj aspiras aŭdi aliajn sonojn; fine via tuta persono volas alian vivmanieron.

Tiu alia vivo ne estos daŭra, sed ĝi plenigos vian animon per dolĉaj rememoroj.

Vi povas akiri tiun plezuron dum la libertempo, pli aŭ malpli grandan, laŭ viaj monrimedoj.

Sed, kien iri? Demando embarasanta kaj malfacila por klarigi.

Tiun jaron, dum la aŭgusta monato, la Sepa Universala Kongreso de Esperanto okazos en Antverpeno, kaj multaj estos la esperantistoj irontaj tien. Tiel ili pasigos sian libertempon.

Kial ili ne utiligos sian vojaĝon por vidi la belaĵojn starantajn sur la vojiro?

Ĉu vi deziras ĝin la ensorĉadon de montoj kaj valoj, viziti la fortikigitan urbon kaj la fabrikantan urbegon? Trapasu la ardenajn landojn, kiuj krom tio posedas multajn beletajn pejzaĝojn.

Sed, vi demandas min: „Kie tiu regiono troviĝas, kies mirindaĵoj vi volas laŭdi.“

Tuj, mi kontentigos vian scivolemon.

La ardenaj landoj kuŝas nordoriente de Francujo. Tiu regiono estas limigita per ĉampajnujo kaj Belgujo. Ĝia plej bela kaj interesa parto estas, ne kontraŭdireble, la valo de „Meuse“, komenciĝanta apud Charleville-Mézières por finiĝi en Belgujo trans Givet.

En la ardenoj, la montetoj sin intersekvas sen ŝajna ordo, prezentante la grandiozan aspekton kaj la sovaĝan karakteron de la altaj montoj, precipe tiuj, kiuj borderas la „Meuse“ kaj la „Semoy“ pro l' abrupteco de la deklivoj, pro la ŝtonegoj kaj la fendegoj, kiujn oni tie renkontas.

La turniĝantaj valoj de la „Meuse“ kaj de ĝiaj alfluantaj riveroj estas nur fendegoj mallarĝaj en la plataĵo. La plej altaj lokoj estas la „Hauts-Buttés“, la „Roc de la Tour“, la „Dames de Meuse“, la „Quatre fils Aymon“ kaj „Charlemont“. Ĉiuj sito, kiuj estas tiom da naturaj kuriozaĵoj, altiras ĉiujare milojn da turistoj.

Ĉiuj homoj, kiuj havis la privilegion viziti la ardenajn landojn, foriris ravaj intencante reveni kun siaj amikoj.

* * *

La „Meuse“ estas larĝa zigzaga rivero, kun akvoj klaraj kaj fiŝoriĉaj. Ĝi naskiĝas ĉe la plataĵo de Langres, ĝis Charleville, ĝia valo estas larĝa kaj agrabla.

Trans tiu urbo, en la montaro de l' Ardeno, estas nur malhela intermonto, profunda kaj torda. Ofte la montoj aŭ la rokoj, kiuj enpremas ĝin stariĝas abrupte sur la bordo mem de la rivero. En kelkaj lokoj apenaŭ restas spaco por la strato kaj la fervojo.

Tiu valo estas unu el plej rimarkindaj en Francujo.

* * *

Charleville, la plej grava, industria kaj komerca urbo de la regiono, estos la celo de unua haltado.

El tiu urbo, oni povas ekskursi en la ĉirkaŭaĵojn kaj en la valon de nia rivero, per vagonaro aŭ vaporŝipo.

Tie estas esperantista grupo, kiu ricevos la vizitantojn piezurege kaj donos al ili multajn utilajn sciigojn.

Charleville posedas belan bibliotekon kun 23 000 libroj; beletan monumenton de sia fondinto: Charles de Gonzague; ĝi estas konstruita meze de la ĉefa placo, nomita duka, placo admirinda pro siaj arkaĵoj. Estas ankaŭ rimarkindaj urbdomo kaj preĝejo; ĉarmaj promenetoj kiel la monto „Olimpa“, ktp.

Mézières, ĉefurbo proksime de Charleville (ĉar nur bulvardo novkonstruita komunikigas la du urbojn) estas ankaŭ vizitinda pro sia antikva arkitektura preĝejo kaj restaĵoj de siaj antikvaj remparoj kaj citadelo.

Multaj aliaj urboj meritas viziton.

Sedan, posedanta la kastelon, kie naskiĝis la fama generalo Turenne; Givet, kun ĝia fortikaĵo konstruita sub la reĝado de Karlo Va, sur kruta ŝtonaĵo; Douzy, kaj ĝia aviadkampo; Mouzon, kun katedralo la plej stilpura en la regiono (XIII a jarcento) ktp.

* * *

Ĉu vi ne volos profiti vian veturon al Antwerpen por vidi nian regionon? Mi certigas vin, ke vi ne bedaŭros tiun vojaĝon.

Ankaŭ mi esperas vidi vin kaj premi samideane viajn manojn ĉe via pasado en mia urbo: Charleville.

*Georges Ramboux,
membro de U. E. A.*

Kelkaj rimarkoj pri esperanta literaturo.

De Kurt Sommer, Chemnitz.

El ĉiuj ĝis nun aranĝitaj konkursoj de nia Germana Esperantisto la lasta, la kvina, sendube estas la plej bona, ĉar la estimata redaktistaro de G. E. donas al ni la plej grandan liberecon pritrakti la temon. — Tial mi volonte ekkaptas la okazon, iomete kundiskuti pri temo de ĝenerala intereso. — Kvankam nia literaturo nur havas aĝon de ses jaroj, ĝi tamen povus esti jam nun pli granda, ĉar ses jaroj en la dudeka jarcento estas vere ne malgrandaĵo. Sed kio estas la kaŭzo, ke tamen ĝi estas ankoraŭ tiel malgranda? La respondo ne estas malfacile trovebla! Tri kvaronoj el nia literaturo estas tradukaĵoj, sed ne estas ĉies gusto legi tradukaĵojn. — Ni vivas en tempo tre rapid-marsanta, en tempo de eltrovaĵoj kaj elpensadoj, en tempo, en kiu oni disputas, ĉu Esperanto ĉu la aerveturado estas la plej eminenta eltrovaĵo por la homaro. Tia tempo ne permesas al ni esti kontentaj kun tradukaĵoj, sed ĝi postulas proprajn verkaĵojn. Oni verŝajne respondos, ke estas necese fari tradukaĵojn por montri al la neesperantistoj, ke nia lingvo vere estas taŭga fariĝi mondlingvo. Nu, mi konsentas, sed mi devas konfesi, ke ni nun vere havas sufiĉe de ili, eĉ mi konsentas, ke oni estonte traduku ĉion belan kaj gravan diritan kaj dirotan de niaj eminentuloj, sed oni ne forgesu la estantecon kaj komencu labori. — Antaŭ mi kuŝas kelkaj katalogoj, el kiuj mi vidas, ke la vico de l' landoj laŭ esperantista literatura posedo estas la jena: Francujo, Anglujo, Rusujo, Polujo, Germanujo kaj Hispanujo. Ĉiuj aliaj regnoj staras sur preskaŭ sama ŝtupo. Oni vidas, ke Germanujo sin trovas en la kvina loko, kaj kio estas la kaŭzo? En Germanujo aperas la plej granda nombro da gazetoj kaj ĵurnaloj esperantaj, inter kiuj sufiĉe granda nombro estas literaturaj aĵaĵoj. Oni volonte taksas popolon laŭ sia literaturo. Se oni farus tion laŭ nia esperanta literaturo, ni germanoj estus bedaŭrindaj. Sed, dank' al Dio ĉiu esperantisto scias, ke la movado esperanta en Germanujo estas pli ol ie eminenta. Krom tio la esperantistaro en Germanujo konsistas ĉefe el kleruloj kaj sufiĉe kleritaj homoj, kiuj kaŭze de sia scio de fremdaj lingvoj (oni diras, ke la germanoj estas bonaj lingvistoj) jam sufiĉe legis propran kaj fremdlandan literaturon, jen tre grava kaŭzo por fortigi la supre diritan. — Restas al mi nur refoje voki: „donu al ni pli da literaturo“, „sed originalaĵojn!“ ĉar ni ja estas progresemuloj. — Kompreneble oni ricevas tute alian bildon, rigardante la aferon de alia flanko: Se ni povus havi statistikon certan pri librovendado en ĉiu lando, certe Germanujo ne troviĝus en la kvina

loko. — Se oni fine min demandas, kian literaturon mi preferas? tiam mia animo flugas Rusujon al S-roj Kabe kaj Grabowski kaj returnas sin Berlinon al S-ro Jean Borel, kiu bedaŭrinde ĉesis, redakti nian belan gazeton.

Societaro.

Universala Esperanto-Asocio.

Kiel la lastan jaron, U. E. A. faris statistikon pri la servoj plenumitaj de siaj delegitoj dum 1910 jen la kompara etato de la servoj dum 1909 kaj 1910:

	1909	1910
Administrado kaj diversaj servoj	940	3 548
Komerco	1 120	1 474
Turismo	650	635
Junuloj kaj Studentoj	218	394
Servoj al vojaĝantoj	628	1 072
Sumo	3 556	7 123

Korespondaĵoj ricevita kaj forsendita de la Del. 5 754 13 342

Movado de la korespondaĵoj ĉe la Centra Oficejo U. E. A. ne notita 23 940
Gazetartikoloj pri U. E. A. 326 573
Paroladoj pri U. E. A. 218 447

La nombro de la faritaj servoj do duobliĝis. Plie, la unuan fojon estis farita per U. E. A. statistiko pri la esperanta instruado. Laŭ ĝi dum 1910 okazis 710 esperantaj kursoj kun meznombre 11 565 lernantoj.

La komerca fako de U. E. A. komencis la eldonadon de „Komerca Bulteno“. Ĝi aperos kiel senpaga aldono de „Esperanto“ kaj estas sendata al la komercaj konsuloj, kiuj estos ĝiaj ĉefaj kunlaborantoj. Se tiu provo donas kontentigan rezultaton, la Bulteno regule aperos dum 1911.

De la 1a Aprilo ĝis 20. Junio okazas en Berlino grava Internacia ekspozicio por vojaĝo kaj turismo, ĉe kiu Esperanto kaj U. E. A. havas apartan lokon. — La dirita ekspozicio uzis la servojn de U. E. A. por konigi la ekspozicion fremdlanden, speciale per gazetartikoloj.

Jus aperis la 1a Aldono al la Oficiala Jarlibro, kiu enhavas ĉiujn adresojn de novaj delegitoj, ŝanĝojn, ktp. Ĝi estas necesega por la personoj ofte uzantaj la servojn de U. E. A.

La proponoj ekzamenotaj de la 2a Kongreso de U. E. A. (Antverpeno, 26—30. Aŭgusto 1911) devas esti kiel eble plej baldaŭ sendataj al la Centra Oficejo. La lasta tempolimo estas la 25. Junio.

(Oficiale komunikita.)

Dua Kongreso Internacia de Katolikaj Esperantistoj en la Hago (s-Gravenhage) de la 14a ĝis la 19a de Aŭgusto 1911.

Al la katolikaj esperantistoj de la tuta mondo!

Ĉiam antaŭen!

Jen la devizo de l' kongreskomitato kaj ĝia signaldiro, kiun la komitato alvokas al vi ĉiuj katolikaj esperantistoj el la tuta mondo.

„Nia Dua“ ne estos Nederlanda, sed internacia, tutmonda kongreso, kie estos pritraktataj interesoj katolikaj.

Ĉiuj kunhelpu, ĉu riĉaj, ĉu malriĉaj!

Ni laboru, por ke nia kongreso estu brilega sukceso por nia helplingvo internacia „Esperanto“, forta pruvo de ĉiam floranta, vigla katolika vidado, grava paŝo antaŭen al la atingo de l' sankta celo „Paco sur tero al ĉiuj homoj de bona volo“.

Montru vi ĉiuj, ke tiu devizo estas la via, kaj montru vian kunsenton per via materia kaj morala apogo, per via partopreno al „Nia Dua“.

Pretaj estas la kongres- kaj helpkongreskartoj.

Vi, kiuj deziras ĉeesti la kongreson, baldaŭ mendu kongreskarton po Sm 2,100.

Vi, kiuj simpatias kun nia celado, sed al kiuj mankas la tempo iri al 's Gravenhage Aŭguston venontan, mendu helpkongreskarton po Sm 1,050.

Vi, kiuj deziras kunlabori por reklame konigi plej eble nian kongreson, rapide mendu unu (aŭ pli) el niaj belegaj afiŝoj po Sm. 0,450.

Baldaŭ sendu vian poŝtmandaton al unu el niaj kasistinoj Fraŭlino Math Borret, Prins Hendrikstr. 21, aŭ Sinjorino Whitney, Weimarstraat 251, 's Gravenhage, aŭ al la sekretario de via ligo aŭ grupo, kaj vi ricevos la menditaĵon per returnanta poŝto.*)

Precipe, ne forgesu uzadi niajn belajn kongresmarkojn.

La prezo estas tiom malalta: 100 por Sm. 0,450, 1000 por Sm. 3,850.

En la sekvonta numero de „Espero Katolika“, „l' Espérantiste Catholique“, „Germana Katoliko“ k t p. ni publikigos sciigojn pri la ekskursoj okazantaj dum la kongresa semajno.

Ekskurso al insulo „Marken“ mondkonata, al „Volendam“, kie oni admiras la tipajn kostumojn kaj domojn de l' loĝantoj; tra la „Zuiderzee“ kaj reire laŭlonge la pitoreskaj urbetoj Nord-Holandaj Monnikendam, Broek in Waterland“ k.t.p.

Ekskurso tra la giganta haveno de „Rotterdam“ la dua marhaveno de l' Eŭropa kontinento.

Plie okazos vizito al „Scheveningen“ la fame konata Nederlanda banurbo, al ĉirkaŭaĵoj kaj al vidindaĵoj de „s Gravenhage.“

*) En Germanujo oni sin turnu al „Germana Katoliko“, Augsburg, Sulzerstr. 17.

's Gravenhage ne estas la ĉefurbo de Nederlando, tamen la rezidejo de la reĝino, la sidejo de la registaro, kie en ĝia tuta beleco oni povas admiri la Nederlandan arĥitekturon.

Mallonge, la kongreskomitato klopadas kaj penadas kunigi la utilon kun la agrablo dum la kongressemajno, por ke la partoprenantoj en la kongreso ĝuu kiel eble plej multe sian viziton al la rezideja urbo, por ke la elspezoj de la kongresantoj estu plej eble malaltaj, por ke ĉiuj partoprenintoj ege kontentaj returnen iru al sia hejmo.

Pro tio: Ĉiam antaŭen, katolikaj esperantistoj, gesamideanoj el la tuta mondo; ĉiam antaŭen por la sukcesigo de „Nia Dua Kongreso“.

La Kongreskomitato.

Vegetaranoj!

Kiel sekretario de la Internacia Unuiĝo de Esperantistaj Vegetaranoj, mi veturis al Lübeck, nia germana kongresurbo, por trovi taŭgan manĝejon por la vegetaranoj.

Mi interkonsentis kun la mastrino de l' restoracio „Zum Deutschen Kaiser“, Königstrato 41, ke ŝi preparos por la kongresanoj vegetaranaj specialajn vegetarajn manĝaĵojn.

La 5an de Junio, samtempe kun la festeno de l' ĝeneralaj kongresanoj, ni havos specialan vegetaran festeneton je malalta prezo en la suprecitita restoracio, kaj mi insiste petas ĉiujn vegetaranojn, kiuj veturos al la kongreso, ke ili informu min tuj pri tio, por ke mi povu mendi la necesan nombron de rezervotaj seĝoj por tiu komuna manĝado.

Ankaŭ en Hamburg, ĉiuj vegetaranoj povos manĝi kune, kaj mi rekomendas al la samideanoj, ke okaze je la komunaj promenoj ili turnu sin aŭ al nia internacia sekretario, S-ro de Ladevèze, aŭ al mi, por informiĝi pri ĉiuj detaloj.

Mi ripetas mian peton, ke vi sciigu al mi tuj vian aliĝon al la komuna vegetara festeno en Lübeck.

Kun frataj salutoj

*Oscar Bünemann, Hamburg 31,
Eidelstedterweg 121a.*

Diversaj informoj

Unua universala kongreso de la rasoj.

26.—29. Julio 1911, London.

La kongreso de la rasoj, pri kiu G. E. jam mallonge atentigis, promesas esti unu el la plej influoriĉaj de nia epoko. Guste nun, kiam la diferencoj de rasoj, kiujn la evoluo de la modernaj komunikiloj enkontaktigas, pli ol iam estas sentitaj, havos grandan signifon tia okazantaĵo, kiu transiros kaj forgesigos dum kvar tagoj ĉiujn interrasajn barojn.

La kongreso — nomita „Harmonio“ — estos grava ne nur per sia tendenco tiel simila kaj favora al Esperantismo, sed ankaŭ por la graveco de la personoj, kiuj konsentis doni al ĝi sian moralan helpon. Mi citas el la programo:

„Inter la kongresanoj, kiuj venas el kvindek landoj, troviĝos tridek prezidantoj de parlamentoj, la plimulto el la membroj de la konstanta korto de

internacia tribunalo kaj de la Dua konferenco de Hago, dekdu ŝtatestroj kaj ok unuaj ministroj anglaj, pli ol kvardek episkopoj anglikanaj, pli ol cent tridek profesoroj de internacia juro, la ĉefaj antropologoj kaj sociologoj, la direktoroj kaj la plimulto el la konsilantoj de la interparlamenta unio, kaj multaj aliaj alt-rangaj personoj. Inter la verkintoj de raportoj sin trovas gravaj reprezentantoj de pli ol dudek diversaj civilizacioj, kaj la raportoj pri la orientaj popoloj estas ĉiuj verkataj per eminentaj personoj el tiuj ĉi landoj.“

Kun granda ĝojo ni povas konstati, ke inter la verkantoj de raportoj troviĝas ankaŭ Dro Zamenhof, kaj ni povas esperi, ke la ideo pri internacia lingvo faros grandan novan paŝon.

Pri la tre riĉa kaj interesplena programo de la kongreso la spaco ne permesas raporti pli detale. La Sekretario S-ro G. Spiller, 63 South Hill Park,

Hampstead, London, sendas programon laŭ demando (skribu esperante). Personoj, kiuj ne mem povas ĉeesti la kongreson, povas ricevi ĉiujn dokumentojn kiel pasivaj membroj.

Ni esperas, ke la kongreso „Harmonio“ sukcesu bone, kiel signo de nia tempo kaj de la nova sento, kiu venis en la mondon.

Dro W. Marchand, Vieux-Dieu.

Ĉiam portu la verdan stelon!

Kiel utila ĝi estas, se la esperantistoj ĉiam portas sian verdan stelon, mi denove eksciis antaŭ nelonge dum vojaĝo. En D-vagonaro, veturanta de Köln al Trier, mi klopodis interesi por Esperanto unu el miaj kunvojaĝantoj. Al mia alparolo: „Pardonu, Sinjoro, sendube vi jam aŭdis ion pri la helpa lingvo Esperanto“, li rediris: „Jes, certe; mi ankaŭ supozis, ke vi estas esperantisto, vidante vian insignon sur via surtuto.“ Pro tio mi kredis trovi en la sinjoro samideanon, sed tiu (supera instruisto el Euskirchen) klarigis al mi, ke li ja tre interesiĝas pri Esperanto, sed ĝin ankoraŭ ne lernis. Kiam mi montris al li miajn kartojn, ricevatajn per Esperanto el 36 diversaj landoj, subite alparolis min alia kunvojaĝanto, kiu supozeble aŭdis el nia interparolado la vorton „Esperanto“: „Ho, ĉu vi estas esperantisto?“ Kaj nun mi komencis kun tiu sinjoro, franco, interparoladon en Esperanto, kiu sekvigis, ke la supera instruisto estis gajnata por nia afero.

Kiam mi, reveturante Münster'on, estis prenonta bileton, mi trovis ĉe la biletejo junan sinjorinon, kiu, laŭ sia vesto, estis ekkonebla kiel eksterlandulino. Vane ŝi provis interkompreniĝi kun la bileteja oficisto, kiu ŝin fine ignoris. Forirante, la sinjorino rimarkis mian stelon kaj tuj donis al mi kelkajn klarigojn en Esperanto. Kaj tiel mi povis helpi la sinjorinon, kiu estis rusino. La oficiston mi atentigis pri la utilon de Esperanto.

Rudolf Kracht.

An alle Studierenden!

Ist es bis heute eine äusserst schwierige Aufgabe geblieben, die Zahl der Esperantisten statistisch festzustellen, so treten einer Statistik von esperantokundigen Studenten besondere Umstände (häufiger Wechsel des Aufenthaltsortes, beschränkte Dauer des Studiums) hindernd in den Weg. Wie sehr aber gerade hier eine Aufklärung not tut, zeigt die Tatsache, dass heute nicht weniger als vier (!) internationale Esperanto-Studenten-Vereinigungen bestehen (1. Universala Studenta Unio, Budapest; 2. Internacia unuiĝo de Esp. studentoj, Beaune; 3. Ĉiostudenta asocio, Luhačovice; 4. Internacia studenta Esperantista frateco, New-York), die sämtlich die gleichen Ziele verfolgen; jede von ihnen scheint aber von dem Wirken (?) der anderen nichts zu wissen.

Um in einem Lande den Anfang zu machen, richte ich nun an alle Kommilitonen, die Esperanto erlernt haben oder im Begriff sind, es zu erlernen, die Bitte, mir mitzuteilen:

1. ihre Heimatsadresse,
2. ihre Adresse in ihrem jetzigen Studienaufenthaltsort (Sommersemester 1911).

Es ist dies für jeden eine nur geringe Mühe; vorausgesetzt, dass jeder einzelne seine Schuldigkeit

tut, kann aber eine solche Statistik viel dazu beitragen, ein gemeinsames, und dadurch erst wirksames Arbeiten aller studierenden Esperantisten anzubahnen.

Die Einheit bringt den Fortschritt! Jeder helfe!

Erh. Vortisch, cand. phil.,

Nowawes bei Berlin, Friedrichstr. 36.

Insista alvoko!

Por utilo de la vojaĝantaj esperantistoj kiel ankaŭ por konstanta plivigliĝo de propagando estas tre dezirinde, ke ĉiu grupa oficejo, kie troviĝas samideano esperante parolanta, estu ekkonebla per afiŝo, eble kun surskribo „Esperanto-Oficejo“. Miaj spertoj faritaj en tio, pruvis, ke tio estas tre malmultekosta, konstanta kaj efika propagando, ĉar ĉiuj preterpasantaj personoj estas atentigitaj pri Esperanto. Krom tio oni helpas eble al vojaĝantaj samideanoj, kiuj bezonegas informojn kaj estas pro tio en embaraso.

Rob. Pfennigwerth,

Esp. Oficejo, Hirschfelde i. Sa.

La propono de S-ro Pfennigwerth eble estos efektiva per la konkurso de G. E. A. pri farota afiŝo por grupejoj. (Komparu la Oficialan parton de tiu ĉi numero.)

Red.

Senpage

ricevas ĉiu samideano, kiu sendas internacian respondkuponon al Dro Schramm, Dresden 20 (Germanujo) la belegan esperante presitan broŝuron pri la Internacia Higiena Ekspozicio en Dresden. Ĝi enhavas multajn ilustraĵojn kaj bonajn artikolojn kaj estas bona propagandilo. Estas grava afero, ke aperis ne nur nacilingvaj broŝuroj pri la ekspozicio, sed ankaŭ esperanta broŝuro. Ĉar ni volas montri al la registaro, urbeŝtraro kaj estraro de la ekspozicio, kiel granda jam estas la esperantistaro, ni petegas ĉiujn samideanojn sendi internacian respondkuponon. Tuj ili ricevos la valoran libron.

Alvoko

pri Okcident-Siberia ekspozicio.

Dum la somero de la nuna jaro en urbo Omsk (okcidenta Siberio) estos organizata la unua Okcident-Siberia agrikultura-industria ekspozicio. Tiun ekspozicion vizitos multaj homoj el malproksimaj anguloj de Siberio kaj Rusujo. Tre grave estas, ke Esperanto estu plej bone reprezentota en tiu ekspozicio, por ke la kunvenontoj disportu la semojn de Esperantismo tra la tuta lando. Tial Tomska studenta rondeto decidis preni sur sin la organizadon de Esperanto-fako en la ekspozicio, kaj ni esperas, ke la tuta esperantistaro unuanime helpos en tiu entrepreno. Ni petas pri alsendo de gazetoj, libroj, p. kartoj ilustritaj, kaj ceteraj esperantaĵoj. Grava estas ankaŭ la monhelpo: la rondeto ne posedas sufiĉe da mono kaj esperas kovri la elspezojn per la enspezoj de vendado en ekspozicio.

La komitato de Tomska studenta esperantista rondeto.

Adreso: Siberio, Omsk,

Atamanskaja 6, dom Levina, al A. Skalskij.

Schwäbisch-Bayerisches Esperanto-Fest.

Sonntag, den 14. Mai d. J., findet in Kaufbeuren eine Zusammenkunft der Esperantogruppen des Regierungsbezirks Schwaben-Neuburg statt. Das Programm enthält u. a.: Festakt mit Vortrag des Herrn Gymnasiallehrers Dr. Ledermann-Augsburg über die „Wichtigkeit des Esperanto“, Esperantoausstellung, Sitzung der Gruppenvorstände und U. E. A.-Delegitoj, Spaziergänge, Konzert mit Tanzvergnügen, Illumination usw.

Anmeldungen bis 7. Mai an Herrn W. Beideck, Augsburg, Pferseerstr. 17, erbeten.

Alvoko al Kristanaj samideanoj.

Dum la 7a Internacia Esperanta Kongreso en Antwerpen oni aranĝos du kunvenojn por Kristanaj Esperantistoj. Unu kunveno servos por Kristanaj junaj viroj kaj junuloj, la alia por ĉiuj Kristanaj samideanoj. La preparoj por la unua jam bone progresis, tiel ke la kunveno certe okazos en la ĉambro de la K. U. J. V. (U. C. J. G., Rue van Schoonbeke 111, Antwerpen, la 20an de Aŭgusto, posttagmeze. — Pri la dua kunveno oni ankoraŭ interkonsiliĝos pro la kunveno.

Nun oni nepre devas scii la nombron de la partoprenantoj kaj pro tio ĉiuj, kiuj intencas viziti la cititajn kunvenojn estas kore petataj, bonvolu kiel eble plej baldaŭ anonci tion al S-ro Paul Hübner, Hubertusstrato 45, Dellbrück apud Köln (Germanujo).

„Gramatiko donis a nu la logiko“.

Also sprach Herr Peus aus Dessau, wie Gautherot in seinem vorzüglichem Buch „La question de la langue auxiliaire“, p. 298, berichtet, auf dem Kongress in Brüssel 1910. Der Uebersetzer, Herr M. Châlon, der Belgier ist und französisch denkt, gab diesen Satz auf französisch wieder: „La grammaire nous a donné la logique“. Herr Peus regte sich darüber auf und erklärte, dass er gerade das Gegenteil sagen wollte.

Beim Esperanto ist solch ein Irrtum wegen der Akkusativbezeichnung vollkommen ausgeschlossen, wo es heissen würde: „Gramatikon donis al ni la logiko“.

K.

Interesa konkurso!

Ni speciale atentigas niajn legantojn pri grava konkurso, kiu aranĝis S-ro Profesoro R. de Saussure (Antido). La temo estas detale pritraktita en aparta aldono al tiu ĉi numero.

Red.

Der in der vorigen Nummer veröffentlichte Artikel: „Die Delegation“ von Professor P. Christaller, ist auf vielseitigen Wunsch als Sonderabdruck erschienen. Derselbe ist zu beziehen vom Esperanto Verlag Möller & Borel, Berlin, zum Preise von 1,50 M. pro 100 und 10,— M. pro 1000 Stück franko.

Die am 15. d. M. erscheinende Nr. 5 des „La Instruanto“ wird enthalten: Kiel mi lernas paroli Esperanton? (esp. und d.) de P. Höfer; El la Barcelonaj kongrestagoj (esp. und d.) travivaĵo de Charlotte Pulvers; Dialogo de la ĉiutaga vivo (esp. und d.); Korespondo (esp. und d.); Bona konsilo; Daurigo de la burleskaĵo „Sinjoro Herkules“; Humoraĵoj; Dua konkurso de „La Instruanto“; Problemoj kaj enigmoj. — Probenummern versendet gratis der Esperanto Verlag Möller & Borel, Berlin.

In dem oben erwähnten Artikel über die Delegation hatte Herr Professor Christaller angekündigt, dass er den Handlungen der Herren de Beaufront und Couturat noch je ein besonderes Denkmal setzen werde. Das Manuskript zu dem Monument über den erstgenannten Ido-Vater lag uns bereits für diese Nummer vor; wir haben aber doch von der Veröffentlichung des Artikels Abstand genommen, weil wir es vorziehen, den persönlichen Kampf zu vermeiden. Die Veröffentlichung persönlicher Angriffe wollen wir lieber unseren Gegnern überlassen, die ja von dieser Spezialität ausgiebigen Gebrauch machen.

Red.

Bibliografio.

Ĉiuj libroj markitaj per steleto estas riceveblaj per:
(alle mit Sternchen versehenen Bücher sind erhältlich durch.)
Esperanto Verlag Möller & Borel, Berlin SW. 68, Lindenstrasse 18/19.

*Konsiloj pri Higieno de R. Stolle, tradukis J. Borel. (Esperanta Biblioteko Internacia No. 17.) Esperanto Verlag Möller & Borel, Berlin. Prezo 0,20 M. (0,100 Sm.)

Tiu ĉi kajero certe denove pliriĝigas la legolibretaron. Tute rekomendinda ĝi estas ne nur al ĉiuj, kiuj volas aŭ devas flegi malsanulojn, sed ankaŭ al tiuj, kiuj deziras nur prizorgi sian propran sanecon. Bonajn, ofte eĉ bonegajn konsilojn, regulojn kaj sciigojn ne multe konatajn pri la nepre necesaj agoj al la malsanuloj ĝi donas mallonge, sed tamen tute klare kaj precize. Kaj la stilo? Bonega! Certe; ĉar oni nur bezonas rigardi la nomon de la tradukinto. Sufiĉos! — Do mi nur povas insiste konsili al ĉiuj: Legu la libreton kaj agu laŭ ĝi!

Dro Breiger, Berlin.

*Neue Flugblätter der Esperanto-Propaganda-Centrale, Berlin SW., Alte Jakobstr. 133.

No. 7. Esperanto für die Reise.

„ 8. Student und Esperanto.

Das erstere Flugblatt ist speziell für die augenblicklich in Berlin stattfindende Reise-Ausstellung herausgegeben; es kann jedoch auch für alle anderen Gelegenheiten verwendet werden, wenn es gilt, die Vorteile des Esperanto für den Reiseverkehr in überzeugender Weise darzulegen.

Das andere Blatt richtet sich an die Studentenschaft, aus der immer mehr Anhänger für unsere Sache gewonnen werden. Den Propagandisten unter

den Studenten dürfte dieses Flugblatt eine willkommene Unterstützung für die Werbetätigkeit unter den Kommilitonen bilden.

Beide Flugblätter sind von der Esperanto-Propaganda-Centrale oder vom Esperanto Verlag Möller & Borel zu den bekannten Bedingungen zu beziehen. Muster werden kostenlos versandt. *F. H.*

***Esperanto und Ido.** Von Theodor Fuchs, a. o. Universitätsprofessor u. korr. Mitglied der Kaiserl. Akademie der Wissenschaften. — Verlag des Verbandes der deutsch-österreich. Esperanto-Vereine, Wien. Preis 0,10 M.

Ein Wissenschaftler, ein Akademiker spricht in dieser ausgezeichneten Broschüre gegen Ido, die allein seligmachende Weltsprache. Ist so etwas überhaupt möglich, wo doch die Idisten immer damit renommieren, dass sich ihrer Sprache „die ganze Akademikerschaft“ angeschlossen hat? Ja, es ist Tatsache, dass ein Akademiker anderer Meinung ist und die Weltsprache der Gelehrten bekämpft, und zwar in einer Form, die trotz ihrer „akademischen Ausdrucksweise“ nichts an Deutlichkeit zu wünschen übrig lässt. — Die Broschüre ist ein offenes Schreiben des Verfassers, Hofrat Fuchs in Wien, an den bekannten Idistenführer, Professor von Pfaundler in Graz. Es ist eine Zusammenfassung einer lebhaften Korrespondenz, die zwischen den beiden Gelehrten stattgefunden hat. Prof. v. Pfaundler hatte diese Korrespondenz begonnen, indem er seine Verwunderung darüber ausdrückte, dass Hofrat Fuchs noch unter den Esperantisten zu finden sei. Das müsse wohl ein Irrtum sein, denn es sei kaum glaublich, dass sich noch ein Mitglied der akademischen Kreise zum Esperantismus bekenne! Diesen „Irrtum“ hat nun der Verfasser gründlich aufgeklärt und seinem Kollegen eine glänzende Abfuhr zuteil werden lassen, aber in durchaus „akademischem Ton“. — Für Eingeweihte bringt die Broschüre nicht viel Neues; aber für die grosse Zahl derjenigen, die über das Thema „Esperanto und Ido“ nur wenig informiert sind, bringt sie eine Fülle interessanter Materials. Deshalb ist das Heftchen ein vorzügliches Propagandamittel, und es wird besonders dort den Esperantisten gute Dienste leisten, wo Diskussionen über die beiden Sprachsysteme entstehen. Jedem Samideano sei darum die Anschaffung der Broschüre warm empfohlen. *Ek.*

***Karmen** de P. Mérimée; el la franca lingvo tradukis Sam. Meyer. (Kolekto de la Revuo) Hachette & Ko., Paris. Prezo 1,10 M.

Veran ĝuon oni sentas ĉe la legado de tiu ĉi interesa rakonto, kaj la esperantistaro devas danki al la tradukinto, ke li konigis al ĝi tiun ĉi verkon de la fama franca aŭtoro. Kiu ne konas jam el la samnoma opero de Bizet la petolan, delogantan knabinon, kiu fine pereas per la ponardo de sia forlasita amato? Pri simila ciganino Karmen kaj ŝiaj aventuroj la aŭtoro rakontas en sia verko en tiel bonega maniero, ke oni ne formetas la libron antaŭ la legado de la lasta linio. — La esperanta traduko estas modela. Por tio garantias la nomo de la tradukinto, kiu jam per kelkaj aliaj bonegaj verkoj riĉigis la esperantan literaturon. La stilo de tiu ĉi traduko estas flua kaj facile komprenebla; iom tro laŭfranca ŝajnas al mi nur la ofta uzo de „ĝi“ aŭ „ĝin“ en frazoj, kie kutime

ne estas necesa tiu pronomo, ekz. p. 4: . . . montris sin pli parolema, ol mi ĝin esperis. Ankaŭ „la plej malagrabla estis, ke . . .“ (p. 18) ne ŝajnas al mi bona. Sed tio estas negravaĵoj. — Kelkajn novajn terminojn la tradukinto uzas, pri kiuj ne estas necese ion diri, ĉar ili estas bone elektitaj kaj tuj kompreneblaj. Ĉiokaze mi deziras al la libro bonan sukceson; ĝi meritas esti legata. *Ek.*

***Poliglota Vade-Mecum de Internacia Farmacio** de C. Rousseau. Hachette & Cie., Paris. Prezo bindita 6,60 M.

Kun vera miro oni akceptas tiun grandformatan, 288 paĝan volumon, kiu enhavas multan kunigitan el 9 lingvoj laboron. Tia libro kaŭzas fieron pri la progresoj de l'helpa lingvo en sciencaj fakoj! Unue ĝi enhavas klarigajn notojn en lingvoj franca, angla, germana, holanda, hispana, itala, rusa, sveda de la diverslandaj kunlaborantoj. Poste ni trovas tabelojn pri peziloj, mezuroj, mono, termometroj, aerometroj, densimetraj ktp. pri la terminoj kaj signoj, uzataj de l'diverslandaj medicinistoj. La dua ĉefparto enhavas multajn komparajn tabelojn pri formuloj de medikamentoj, ĉerpitaj el farmakopeoj (medikamentlibroj) de 21 landoj eŭropaj, amerikaj kaj japana. La tria ĉefparto estas la faka vortaro enhavanta krom la rilata nomenklaturon la manipuliajn esprimojn, la drogojn de animala kaj vegeta deveno. Unuavice staras la Esperanta esprimo sekvata de la tradukoj en la cititaj ok lingvoj, sed poste sekvas la nacilingvaj leksikonoj kaj fine latina esprimaro. Tiu aranĝo, laŭ la „metodo G. E. M.“, prezentas entute 72 vortarojn kaj ebligas uzi la libron al ĉiu, kiu scias unu el la cititaj lingvoj; ĝi do estas ne nur utila al esperantistaj farmaciistoj sed al ĉiulandaj. Per ĝi farmaciisto estos kapabla, kompreni recepton skribitan en eksterlando. Por pli bone kompreni la helplingvan tekston, kiu interligas la tuton, estas fine aldonata Esperantogramatikoj en la 8 lingvoj. Sed ne nur por farmaciistoj estas rekomendinda la libro, ankaŭ ne-fakanoj trovos multan instruon, ĉar tre multaj el la esprimoj estas uzataj en la komuna lingvo. Domaĝe, ke la libro enhavas ankoraŭ iom multajn preserarojn pleje ne gravajn, tamen ankaŭ kelkajn nekorektaĵojn, sed lerta esperantisto tuj ilin ekkonos. *P. Chr.*

***Wacht auf, Katholiken!** Ein Appell an die Katholiken, besonders an ihre Organisationen, von Ardens. Bayerische Verlagsanstalt Jos. Scholz, Augsburg. 20 Seiten. Preis 0,25 M.

Ausgehend von der Notwendigkeit des internationalen Zusammenschlusses der Katholiken auch auf andern als religiösen Gebieten, setzt die Broschüre auseinander, wie das dieser Einigung entgegenstehende Hindernis der Sprachverschiedenheit durch eine Hilfsprache beseitigt werden kann. Ferner, dass von den bestehenden Sprachprojekten nur Esperanto als Welthilfssprache in Betracht kommt, wie es sich als solche bewährt hat und auf dem Wege zur allgemeinen Einführung ist, wie Esperanto von Katholiken benutzt und von katholischen Autoritäten gefördert wird, und wie es mit Hilfe der „Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista“ besonders von den katholischen Organisationen weiter verwertet werden könnte. Die Broschüre erscheint sehr geeignet, sowohl weitere katholische Kreise für die Esperantosache zu ge-

winnen, als auch den unter Katholiken propagandistisch tätigen Esperantisten wertvolle Anregungen zu geben. Daher ist ihr eine recht weite Verbreitung zu wünschen, die der Verlag hoffentlich durch einen billigen Massenbezugspreis ermöglichen wird. O. F.

* **Du paroladoj** de Edmond Privat, kun antaŭparolo de Prof. Th. Cart, Paris, Presa Esperantista Societo. Prezo 0,25 M.

Tiuj du paroladoj, prezentitaj de S-ro Privat en la kongresoj de Barcelona kaj Augsburg, multe influis la tie ĉeestintojn kaj la tutan esperantistaron. Kvankam parolitaj de nia elokventa samideano, ili eble estis pli impresaj, kelka tamen eble eĉ pli ŝatos lege esplori ilin, por mediti pri la bonegaj ideoj enhavitaj. Kaj al ĉiu skeptikulo pri la efektiva taŭgeco de nia lingvo ili pruvos, ke Esperanto estas vere „vivanta lingvo de vivanta popolo“ kaj instruos lin pri „la vivo de Esperanto“ (titoloj de la paroladoj). H. M.

* **Esperanta Gvidlibro tra Bosnio kaj Hercegovino.** Prezo 0,40 M.

* **Ključ Esperanta** (Esperanta Ŝlosilo por Kroatoj). Prezo 0,05 M.

Jen du eldonaĵoj de l'Asocio de la bosnia-hercegovina esperantistaro „La Stelo Bosnia“ en Sarajevo, kiuj provas la fervoron, kun kiu niaj bosniaj samideanoj laboras por nia afero. Precipe la gvidlibro estas unu el la plej belaj, kiuj ĝis nun ekzistas en Esperantujo. Per bonege represitaj fotografadoj kaj per klarigaj tekstoj ĝi konatigas nin kun la belaj de tiu lando, kaj certe ĝi helpas la alfluon de amuzaj vojaĝantoj kaj turistoj al la nepre vizitinda regiono. Ek.

Muzikaĵoj.

La tagiĝo. Kanto esperantista, originala poezio de Antoni Grabowski, muziko de Baranski. Eldono de Jan Günther. Havebla ĉe la administracio de „Pola Esperantisto“, Varsovio (Polujo), Hoza 20. Prezo 0,100 Sm.

Al Montmartro. Himno de J. Cam. Chaigneau, muziko de F. de Ménil. Eldono de la Sekcio de Montmartre de la Grupo Esperantista de Paris, 51 Rue de Clichy. Prezo: 0,25 Frs. (0,100 Sm).

Jurnaloj.

Juneco. Internacia Informilo de la Junaj Esperantistoj; Paris.

Waren auch von Anfang der deutschen Esperantobewegung an eine ganze Anzahl Jugendlicher in unsern Reihen, so fehlte doch bis vor etwa einem Jahre ein festerer Zusammenschluss gerade unter diesen, oft sehr eifrigen Vorkämpfern unserer Sache. Durch die guten Erfolge der „Franca Federacio de la Junaj Esperantistoj“ ermutigt, die nach der neuesten Aufstellung bereits fast 400 Mitglieder in 15 Gruppen vereinigt, regten einige eifrige deutsche Esperantisten die Schaffung einer gleichen Vereinigung in unserm Vaterlande an. Die endgültige Gründung soll gelegentlich des Deutschen Esperantokongresses in Lübeck erfolgen (Pfingsten 1911). Als Werbemittel erschien die No. 5 des Verbandsblattes „Juneco“, im Umfange von 16 Seiten, grösstenteils in deutscher Sprache. Eine Reihe von vorzüglichen Artikeln von Dr. E. Kliemke, E. Heydweiller, Prof. Dr. Wetekamp u. a. legt den Wert des Esperanto gerade für die Jugend dar. Besonders bemerkenswert ist auch der Artikel von Luise Richter „Warum soll ein junges Mädchen Esperanto lernen“; denn gerade die weibliche Jugend findet in dem Studium des Esperanto viel Anregung, und ihre Mitarbeit an der Erreichung unserer Ziele ist von grosser Bedeutung.

Jeder, der unsrer Sache unter der Jugend Freunde und Anhänger zu werben versucht, lasse sich deshalb eine entsprechende Anzahl der „Deutschen Werbnummer von Juneco“ von Herrn E. Heydweiller, Göttingen, Bunsenstr. 12, kommen. Ein Exemplar wird an Interessenten kostenlos abgegeben, jedes weitere kostet nur 25 Pf.

Oficialaj sciigoj de la Germana Esperanto-Asocio (G. E. A.)

Deutscher Esperanto-Bund (Eingetr. Verein) Geschäftsstelle: Bromberg, Neuer Markt 8.

Examina des Deutschen Esperanto-Bundes.

Die unterzeichnete Kommission gibt hierdurch bekannt, dass die nächsten Esperanto-Prüfungen am 3. Juni d. J. in Hamburg abgehalten werden. Um die Resultate möglichst schon während des Lübecker Kongresses (5.—7. Juni) veröffentlichen zu können, ist der Schlusstermin für die Einlieferung der schriftlichen Hausarbeiten auf den 22. Mai festgesetzt. Das Aufgabenmaterial hierfür ist ab 1. Mai erhältlich; den Gesuchen ist das Prüfungshonorar beizufügen, für Supera Ekzameno (Atesto pri Lingva Kapableco) 6,— M., für Speciala Ekzameno (Atesto pri Instrua Kapableco) 10,— M.

Alles Nähere betr. Anforderungen an die Prüflinge, Erteilung der Diplome usw., ist aus dem Regular

ersichtlich, das gegen Einsendung von 20 Pf. in Briefmarken versandt wird. — Genaue Angaben über Zeit und Ort des vor der Kommission abzulegenden Teiles der Prüfungen (voraussichtlich am 3. Juni, nachmittags im Lehrerinnenseminar, Hamburg) werden den Kandidaten noch zugehen.

Die Prüfungs-Kommission des Deutschen Esperanto-Bundes.

Felix Epstein, Sekretär,
Hamburg 13, Grindelallee 5, II.

Lübecker Kongress.

3. Teilnehmerliste. a) Kongresanoj: 75. Fr. A. Körner, Braunschweig. 76. Fr. E. Howaldt, Braunschweig. 77. Oberamtsrichter A. Reinking, Braunschweig. 78. F. Rockmann, Magdeburg. 79. Frau Borel, Berlin.

80. Frau E. Wurm, Hamburg. 81. W. Zwoch, Magdeburg. 82. H. Wustrow, Magdeburg. 83. Frl. M. Schreiber, Magdeburg. 84. E. Stark, Magdeburg. 85. Frau A. Stark, Magdeburg. 86. F. Stark, Magdeburg. 87. E. Stark, Magdeburg. 88. H. Mangelsdorf, Magdeburg. 89. Frl. M. Schede, Leipzig. 90. J. Gerlof, Hamburg. 91. J. Schneider, Hamburg. 92. Frl. E. Henneke, Hamburg. 93. Frl. R. Henneke, Hamburg. 94. Propst E. Becker, Schrimm. 95. Prof. Dr. Köppen, Hamburg. 96. Frau Prof. Dr. Köppen, Hamburg. 97. F. Wegner, Hamburg. 98. W. Neurath, Wernigerode. 99. Frl. C. Reuter, Lübeck. 100. Frl. S. Freese, Lübeck. 101. Dr. A. Olshausen, Hamburg. 102. Dr. R. Gagzow, Lübeck. 103. Frau Dr. Gagzow, Lübeck. 104. O. Warncke, Lübeck. 105. R. Schulze, Lübeck. 106. Frau Schulze, Lübeck. 107. Frl. A. Lemcke, Hamburg. 108. A. Schöne, Hamburg. 109. Frl. A. Mikkelsen, Kopenhagen. 110. E. Wichert, Charlottenburg. 121. R. Wohlstadt, Kiel. 122—125. A. Herrmann, Magdeburg.

b) Helpkongresanoj: 4. O. Graeger, Magdeburg. 5. A. Lutteroth, Lauban. 6. Esperanta klubo „Abio verda“, Wernigerode. 7. Esperanto-Grupo Delitzsch. 8. Esperantista Societo Kottbus. 9. W. Schlag, Kötzschenbroda. 10. J. von Böhl, Dünth. 11. A. Camuffo, Capo d'Istria.

* * *

Musikalische, deklamatorische usw. Darbietungen während des Kongresses.

Damen und Herren, die gewillt sind, durch Vorträge oder Vorführungen musikalischer, deklamatorischer oder dramatischer Art etwas zur Unterhaltung und Erheiterung der Kongressbesucher beizutragen, werden gebeten, dies baldmöglichst unter genauer Bezeichnung der Darbietung dem Kongress-Ausschuss mitzuteilen.

Der Kongress-Ausschuss.

Dr. A. Möbusz.

Annoncen für das Kongressbuch.

In das Kongressbuch, das anlässlich der Jahreshauptversammlung in Lübeck verteilt werden wird, können auch Annoncen aufgenommen werden. Bestellungen umgehend erbeten. Nähere Auskunft erteilt die Leitung des Kongress-Ausschusses.

Dr. A. Möbusz.

Abgeordneten-Vollmachten für den Bundestag.

Die Formulare für die Abgeordneten-Vollmachten sind schon vor längerer Zeit versandt worden.

Ortsgruppen, die versehentlich keine Vollmacht erhalten haben, wollen sich an Ressort V, Dresden, z. H. Herrn von Frenckell, wenden.

Jahresberichte der Ortsgruppen.

Um in Lübeck ein anschauliches Bild über die Entwicklung von Esperanto in Deutschland im vergangenen Jahre zu geben, werden hierdurch sämtliche Ortsgruppen des Deutschen Esperanto-Bundes gebeten, spätestens bis zum 15. Mai an unterzeichnete Geschäftsstelle einen Bericht über ihre Tätigkeit im vergangenen Jahre zu liefern. Es kommt dabei darauf an, ohne jede Schönfärberei eine genaue Schilderung

zu haben, wie sich der Verein entwickelt hat, welche Hemmnisse sich in den Weg gestellt haben, welche Veranstaltungen ohne Erfolg geblieben sind, welche Veranstaltungen andererseits von Erfolg begleitet waren und dergleichen mehr. Von einem Fragebogen, wie er bei anderen Verbänden üblich ist, wird für dieses Jahr noch Abstand genommen. Wir hoffen aber, dass alle Gruppen bereit sind, einen zusammenfassenden Bericht über ihre Tätigkeit zu geben, damit die Erfahrungen gesammelt und für alle Esperantisten nutzbar gemacht werden können.

Mit Esperantogruss!

Die Geschäftsstelle.

Technisches Wörterbuch.

Für das in Arbeit befindliche Chemisch-technische Wörterbuch der Esperantosprache werden noch einige Mitarbeiter gesucht.

Meldungen sind zu richten an die Geschäftsstelle, Bromberg, Neuer Markt 8.

Preis Ausschreiben betr. Gruppenplakat.

Ein Gruppenplakat (für Bahnhöfe und „grupejoj“) wird gewünscht. Höhe 46 cm, Breite 32 cm (acht-faches Monofformat).

Anzubringen sind: Die Aufschrift „Germana Esperanto-Asocio“, der Esperanto-Stern, ein Bundesabzeichen (ebenfalls zu entwerfen), ferner unten ein etwa 10 cm hoher Raum für die Gruppenadresse oder Geschäftsstelle. Um die Gesamtwirkung besser beurteilen zu können, ist beim Entwurf einzuzeichnen:

Berlin, Esperanto-Gesellschaft, Dienstag (Mardo),
1/2 9 Uhr, Rest. A. Kuss, Karlstr. 27.

Klare, leicht lesbare Schrift, sogenannte Lateinschrift, wird verlangt; es empfiehlt sich, nicht ausschliesslich grosse Lettern zu verwenden, da erfahrungsgemäss derartige Wörter weniger leicht auf einen Blick lesbar sind.

Die Ausführung ist in Blech, mit leichter Reliefprägung emailliert, in drei Farben gedacht.

Verlangt wird der farbige Entwurf in natürlicher Grösse; ein darauf angebrachtes Kennwort ist, wie üblich, auf einem beiliegenden Briefumschlag, der die Adresse des Verfertigers enthält, zu wiederholen. Die Arbeiten sind bis zum 1. Juni mit der Bezeichnung „Bundesplakat“ an die Geschäftsstelle des Kongresses in Lübeck, Falkenstr. 12, einzusenden.

Die eingelaufenen Arbeiten werden während des Kongresses ausgestellt und beurteilt.

Es sind 3 Preise vorgesehen im Betrage von 25, 15 und 10 M.

Besuch von Kongressen.

Esperantisten, die Kongresse aller Art, namentlich aber die der nationalen Esperanto-Propaganda-Gesellschaften, im In- und Auslande zu besuchen gedenken, werden gebeten, stets der Geschäftsstelle des Deutschen Esperanto-Bundes davon Mitteilung zu machen, da es mitunter von Wert ist, eine offizielle Vertretung des Bundes bei den Kongressen zu haben, die wegen der Reisekosten unter Umständen unterbleiben müsste.

Mit Esperantogruss!

Der Vorstand.

Kunsido de la konsilantaro de Germana Esperanto-Asocio.

25an kaj 26an de Marto 1911 en Braunschweig.

Ekstrakto el la protokolo.

Ĉeestas: el la estraro: S-ro Dro Möbusz; el la konsilantaro: S-ino Hankel, F-ino Jahns kaj S-roj Dro Arnhold, Reinking, Rockmann, Schiff kaj Tarnow, poste Borel, Epstein, von Frenckell kaj Vogler.

Mankas senkulpigitaj: S-roj Dro Mybs, Dro Kandt, Prof. Christaller, Dro Dietterle, Gottgetreu, Dro Orthal, Prof. Rohrbach, Prof. Schmidt kaj Dro Seemann.

1. Oni rezignas la voĉlegadon de l' protokolo de la antaŭa kunsido kaj akceptas ĝin sen kontraŭdiro.

2. kaj 3. estas prokrastataj.

4. Laŭ propono de S-ro Reinking oni decidas, sendi al la Duko-Reganto de Braunschweig salut-telegramon.

7. Al la preparolado de letero el Frankfurt a. M. oni altiras S-ron Skeide kiel reprezentanton de la Grupo Frankfurt. Komence S-ro Schiff voĉlegas la koncernen korespondon. Poste S-ro Skeide diras, ke li estas komisiita de la Esperanto-Grupo Frankfurt deklari, ke la grupo staras fidele al Esperanto. Speciale li deklaras en la nomo de S-ro Hummel, ke li neniel inklinas al idistaj celadoj. La konsilantaro favore akceptas ambaŭ klarigojn.

Al 2. (fakraportoj) proponas S-ro von Frenckell, ke la konsilantaranoj ĉiujare tuj post la fino de l' agad-jaro skribe raportu pri siaj fakoj al la prezidanto de l' konsilantaro. Tiu ĉi raportoj estas, se eble samtempe, komunikotaj al la konsilantaranoj.

Oni konstatas, ke S-ro Lüers pro troŝarĝo de laboro ekŝiĝis el la konsilantaro. La konsilantaro kun bedaŭro sciĝas pri tio. La ofico restos provizore vakanta; pri kelkaj kandidatoj oni konfidencie parolas.

* * *

La kunsido estas daŭrigata la 26an de Marto antaŭtagmeze je la 10^{1/2}a. Ĉeestas la samaj personoj, kiel la tagon antaŭe kaj krom ili el la estraro Dro Kandt.

Post voĉlegado kaj aprobo de l' protokolo pri la antaŭtaga kunsido oni daŭrigas punkton 2, la raporton pri la fakoj. Dro Orthal petis, komisi al li anstataŭ lia ĝisnuna fako la fakon „Esperanto inter la blinduloj“. La konsilantaro aprobas tiun ĉi ŝanĝon.

S-ro von Frenckell raportas pri la sukceso de la rond-demando koncerne oratorliston. Oni decidas, publikigi la nomojn de ĉiuj sin anoncintaj personoj kun la aldono, ke la asocio ne garantias pri la taŭgeco de la listanoj.

Plue S-ro Rockmann raportas, ke li estas en konstanta interrilato kun S-ro Heydweiller, kaj ke la Unuiĝo de Junaj Esperantistoj bone evoluas. En la ĉi-jara somero oni intencas entrepreni vojaĝon al Paris kun 10 junaj esperantistoj.

S-ro Tarnow raportas pri liaj klopodoj por diversaj ekspozicioj (Krefeld, Berlin k.t.p.). Okaze de tio Dro Arnhold proponas, estonte dividi la fakojn „ekspozicioj kaj kongresoj“. Oni aprobas tiun ĉi proponon. S-ro Schiff petas speciale, helpi la Potsdam-an Esperanto-Centron per transsendo de materialo, kolektota por konstanta ekspozicio. Plue oni preparolas kelkajn aliajn ekspoziciojn kaj kongresojn kaj rekomendas tute speciale, sendi kiel eble plej

multon al la granda ekspozicio okaze de la 6a germana kongreso.

Oni decidis, laŭ la antaŭtaga propono de S-ro von Frenckell, ke la fakestroj antaŭ ĉiu kunsido de la konsilantaro sendu mallongajn raportojn al la oficejo en Bromberg, sed tiel frue, ke ili povos esti ĝustatempe komunikataj al ĉiuj membroj.

Post tio la ceteraj ĉeestantoj buŝe raportas pri siaj fakoj; oni parolas detale pri tio.

Intensive oni preparolas precipe la demandon pri fondo de unuiĝo de komercistoj, oni proponas, elekti por la fako „komercio kaj industrio“ en Lübeck specialan komision.

La en la lasta kunsido farita propono, koncernenanta preterdonan kontrakton kun la asekura societo Janus, estas ekzamenita de la komiso. Ĝi proponas, rekomendi al la societo, fari tiajn kontraktojn kun la unuopaj lokaj grupoj. Oni decidas laŭ tio.

Pri propono farita al la komiso por la ekzamenoj, doni la fakulton por instruo, ne estas eble decidi, ĉar tio postulus antaŭan ŝanĝon de la regularo.

Laŭ propono de Dro Kandt oni decidas, elekti por la fakoj „komercio kaj industrio“ kaj „batalo al kontraŭulaj celadoj“ specialajn komisionojn. La elektoj okazos en Lübeck.

Koncerne la administran regularon de la konsilantaro oni proponas, la por la kongreso gravajn punktojn antaŭe prikonsili kaj okazigi la plej proksiman kunsidon de la konsilantaro nur en Lübeck ĉe la kongreso. Tiu ĉi propono estas akceptata per ĉiuj kontraŭ unu voĉo.

Plue Dro Kandt raportas pri la starigo de la etato.

Poste oni preparolas, sekvante la regularon, la proponojn por ties ŝanĝo okaze de la Lübeck'a kongreso. Oni proponas: la lasta frazo de l' § 1 estas ŝanĝota en: La administra kaj kalkula jaro estas la kalendara jaro. Tiu ĉi propono estas unuvoĉe akceptata.

Al § 4. Propono, aliformigi la regularon laŭ tio, ke la grupoj, apartenantaj al la asocio, esprimu tiun ĉi apartenecon en siaj nomoj, estas retirata kaj oni decidas, aldoni tion kiel nuran deziron al la regularo per piednoto.

En § 5 la lasta frazo: „se“ — „ĝis“ estu forstrekata. Sed tiu propono estas retirata.

Koncerne § 6, la farita propono estas retirata, post kiam oni interkonsentis, ke esperantistaj studentaj kaj fakaj unuiĝoj ne estas konsiderotaj kiel lokaj Esperanto-grupoj.

En § 8 oni anstataŭas la vortojn „la de Majo aŭ la de Novembro“ per „la de Januaro aŭ la de Julio“.

Koncerne § 11 oni faras diversajn proponojn. Oni decidas enmeti en la tekston: a) fundamenta kotizaĵo 5 markoj. Por tio ĉiu grupo ricevas senpage kaj sen poŝtkostoj po unu ekzempleron de la asocia gazeto kaj de ĉiuj de la asocio eldonotaj publikigaĵoj (korespondadoj, jarlibro k.t.p.).

Anstataŭ a) estas metota b), anstataŭ b) c).

Proponoj, plialtigi la kotizaĵojn de 2 M. ĝis 2,50 M. respektive de 0,30 M. ĝis 0,50 M. estas malakceptataj.

La propono al § 11, pagigi jaran helpkotizaĵon de maksimume 1 M. estas retirata kaj provizore prokrastata.

En alineo 3 oni anstataŭas la vortojn „la de Majo

kaj la de Novembro" kaj „senkoste“ per „la de Januaro kaj la de Julio“ kaj „senpoŝtkoste“.

La propono, malaltigi la kotizaĵon por la eksterordinaraj anoj de 6 M. ĝis 5 M. estas malakceptata.

§ 14 estonte havos la tekston: La estraro konsistas el 3 membroj:

1. la prezidanto,
2. la vicprezidanto,
3. la sekretario.

La estraro estas helpata de kasisto.

En § 15 oni anstataŭas la lastajn vortojn „komuna novelekto“ per „ĝeneralkunveno“.

En § 19 oni anstataŭas la vortojn „la duono“ per „unu triono“.

En § 18 oni enŝovas post la unua frazo „La estro de la fako „financoj“ estas samtempe kasisto“.

En alineo 2 oni diras anstataŭ „ĝi“ „la konsilantaro“.

En § 20 oni forstrekas sub 6) la vortojn „kaj por“. La vortojn: „La egaligo ĉe“ ĝis „asocioj“ oni provizas per la aparta numero 7). Poste oni enŝovas „8) La decido pri malinterkonsentoj koncerne la limojn de najbaraj ligoj“.

Laŭ tio oni korektas numerojn 7) kaj 8) en 9) kaj 10).

§ 22 estonte havos la tekston: „La tempo de la kunveno estas publikigota minimume du monatojn kaj la tagordo minimume unu monaton antaŭ la kunveno.“

En § 26 oni anstataŭas la vortojn „Majo ĝis Julio“ per „Aprilo ĝis Aŭgusto“.

En alineo 3 oni anstataŭas la vortojn „ĝis la 1a de Marto“ per la vortoj „ĝis 6 semajnoj antaŭ la ĉefa jarkunveno“.

En § 28 oni forstrekas la vortojn „ĉiuj“ ĝis „eldonistoj“, sed aldonas „Ĉiuj koncernaj kontraktoj, kiuj estas destinataj, valori pli longe, ol 5 jarojn, bezonas la aprobon de la ĝeneralkunveno“.

La aliformigaj proponoj estas — se eble — publikigotaj en la kongreslibro.

Propono de Dro Möbusz, ke dum la 1a kaj 2a kongrestago oni en Lübeck intertraktu esperante, estas transdonata al la kongresgvidantaro.

Unuvoĉe oni decidas, ke la Zamenhoffondo subskribu ĉirkaŭe 290 brikojn por la 100 000 M.-fondo.

Deutscher Esperanto-Bund.

Voranschlag der Einnahmen und Ausgaben für G. E. A. für 1912.

Einnahmen: M.	Ausgaben: M.
6000 Mitglieder	Gehälter 1600
à 40 Pf. 2400	Bureaumiete 300
Andere Einnahmen 400	Porto, Telephon, Telegraph 300
	Schreibmaterial u. Utensilien 200
	Reisekosten 200
	Zeitschriften, Bibliothek, Inserate usw. 100
	Diverses und zur Abrundung 100
2800	2800

Festgestellt in der Sitzung des Beirats zu Braunschweig am 26. März 1911.

Zamenhoffonds.

Sammlung anlässlich der Beiratssitzung in Braunschweig	43,— M.
Vergl. G. E. 4, S. 92	3020,46 „
zusammen	3063,46 M.

Schluss des offiziellen Teils.

Hinweis.

Für unsere Leser liegt der heutigen Nummer ein Prospekt, betreffend die Original-Unterrichtsbriefe der Methode Toussaint-Langenscheidt bei, worauf wir alle aufmerksam machen, die sich die Kenntnis fremder Sprachen sicher, bequem und ohne grosse Kosten durch Selbststudium (ohne Lehrer) aneignen wollen. — Die Langenscheidtsche Verlagsbuchhandlung (Prof. G. Langenscheidt), Berlin-Schöneberg sendet auf Wunsch Probebriefe der einen oder anderen Sprache kostenlos zur Ansicht. Bei Benutzung der obigem Prospekte beigefügten Bestellkarte bitten wir den Titel unserer Zeitung anzugeben.

Neu-Anschlüsse (bis 15. April 1911) seit Veröffentlichung der Gruppenliste vom 1. Februar 1911.

- Annaberg - Buchholz (Sa.),** Esperantista Grupo (Nov. 09). Rest. „Fürst Bismarck“, Donnerst. 9 Uhr. Of. u. Vors. Oberl. H. Bergsträsser, Logenstr. 18.
- Berlin-Nord,** Esp.-Gr. Nordberlin (März 09). Schmidt's Festsäle, Gartenstr. 6, N. Mittw. 9 Uhr. Of. u. Vors. Wilh. Schmidt, Berlin N. 24. Linienstr. 124.
- Berlin-Wilmersdorf,** Esperantogrupo G. E. A. (Febr. 11). „Landhaus“, Kaiser-Allee, Ecke Berlinerstr. Dienst. 8 Uhr. Of. u. Vors. Zahnarzt H. Blum, Prinzregentenstr. 120. Tel. Wilms. 5528.
- Cöthen-Anhalt,** Esper. Rondo „Friedrichs-Polytechnikum“ (Dez. 10). Café Heidenreich. Dienst. 8 1/2 Uhr u. Mont. 5 Uhr im Polytechn. Of. u. Vors. Dipl.-Ing. W. Kohli, Schloss Geuz, Kr. Cöthen i. Anh.
- Düsseldorf,** Esperantisten-Gruppe (Jan. 07). „Rheinhof“, Donnerst. 9 Uhr. Of. B. Luis, Werstenerstr. 28. Vors. E. Eggert, Schumannstr. 78. (U. E. A.)
- Ebersbach i. Sa.,** Esperanto-Gruppe (April 10). Hotel „Stadt Zittau“, Freit. 9 Uhr. Of. u. Vors. Poliz. Ew. Rätzig.
- Gaggenau,** Ortsgr. d. Deutsch. Esp. Bundes (Mai 11). Rest. „Felsenschlüssel“, Dienst. 1/2 9 Uhr. Of. u. Vors. Ing. Ant. Sonnet, Benz-Werke. (U. E. A.)
- Halle a. S.,** Esperantisten-Gruppe (Dez. 05). Jeden 2. Montag. Rest. „Schultheiss“, Poststr. Of. A. Schönfeld, Gr. Märkerstr. 8. Vors. Ing. W. Knoff, Henriettenstr. 32. (S. T. E. L.)
- Leobschütz,** Esperanto-Gruppe (Nov. 10). Rest. Wilh. Franz. Mont. 8 Uhr. Of. u. Vors. Betriebsleiter C. Lorenz, Rati-borerstr. 3.
- Ludwigshafen,** G. E. A.-Ortsgruppe (Febr. 11). Kaufm. Verein. Mittw. 9 Uhr. Vors. Th. Bernhart, Rottstr. 35.
- Magdeburg,** Presista Grupo Esp. „Progreso“ (Ang. 10). „Vereinigung“, Dienst. 8 1/2 Uhr. Of. u. Vors. E. Kolosche, Krügerbrücke 1. (U. E. A.)
- Mülhausen i. Eis.,** Esperanto-Verein (Jan. 11). 1. Dienst. u. jed. Mittw. 1/2 9 Uhr. „Chalet Ifrig“, Of. u. Vors. Steuerprakt. Baumann, Zurheinstr. 2.
- Münster i. Westf.,** Esperanto-Verein (Febr. 11). „Zam Dortmund“, Rotenburg. Dienst. 8 3/4 Uhr. Of. Otto Marquard, Industriestr. 26. Vors. H. Braun, Warendorferstr. 103.
- Offenbach a. M.,** Esperantisten-Gruppe. (Juni 10). Hotel Degenhardt. Donnerst. 8 1/2 Uhr. Of. u. Vors. J. Stüttmann, Bleichstr. 47.
- Radeburg i. Sa.,** Esperanto-Gruppe (Juli 10). „Ratskeller“, Mittw. 7 Uhr. Of. u. Vors. Lehrer R. Thiele, Radebergerstr. 171 d. (S. L.) (U. E. A.)
- Schleiz (Reuss i. L.),** Esper.-Grupo (März 11). Hotel „Sonne“. Of. u. Vors. Redakteur Rich. Kannopka, Teichstr. 13.
- Schleswig,** Esperanto-Klub (Januar 11). Freit. 8 Uhr im Seminargebäude. Of. u. Vors. Amtsgerichts-Sekr. G. Holtorf, Moltkestr. 18. (N. A. L.)
- Waldheim i. Sa.,** Esperantista Grupo (März 11). Café Römer. Mittw. 1/2 9 Uhr. Of. Fr. J. Gersdorf, Gartenstr. 5a. Vors. Max Bontemps, Obermarkt 47. (S. L.)